


ESPERANTO



N-ro 613 (12)

Decembro 1956



REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 613 (12)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Cion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu duon da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Ospedale Maggiore, Parma, Italujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

La 15a de decembro	177
La Tago de la Homaj Rajtoj	177
Bazaj principoj de informado pri Esperanto	178
Denaske nia! I. G. Braga	181
Kristnaskdonaco. A. Eglitis	182
El „Eseo pri la kritikado“.	
A. Pope (W. Auld)	185
La sufero de l'aliaj. C. Piron	185
Antikva Marseille	186

Rubrikoj

CED	180
Belarta Konkurso 1957	184
La Juna Vivo	187
42a U.K.	188
Esperantista vivo & Nekrologo	189
Radio	189
La Internaciaj Konkursoj	189
Novaj Libroj	190
Oficiala Informilo	192

La 15a de Decembro

Je tiu tago, la datreveno de la naskiĝtago de L. L. Zamenhof, iniciatinto de la lingvo Esperanto, la esperantistoj ĉie en la mondo kutime pensas tute speciale pri la signifo de la Internacia Lingvo kaj la Internacilingva Movado.

Neniu supozas, kaj Zamenhof mem ne supozis, ke komuna lingvo per si mem forigos ĉiujn malkonsentojn kaj miskomprenojn inter la homoj: „ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj” li skribis; tamen ĉiu saĝa homo, kiu mem havas sperton, eĉ tre modestan, pri la internaciaj rilatoj, scias tre certe, ke komuna lingvo estas nemalhavebla kondiĉo por interhoma kompreniĝo kaj kunvivado. Kun ĝi, interkonsento povas okazi; sen ĝi, interkonsento ne povas okazi.

Homoj, kiuj ne havas komunan lingvon, tro volonte kaj eĉ senintence rimarkas unuavice la diferencojn inter si, kiuj pro nekomprene ekludas tro elstaran rolon en la homaj rilatoj. Kaj la diferencoj inter la homoj kaj inter la nacioj estas ĉiam tre malgravaj; ili estas diferencoj de kutimoj kaj moroj: diferenco de vestaĵoj, de kuirado, de arkitekturo, de ĝentilec esprimo — unuvorte, de tute supraĵaj aferoj, kiuj preskaŭ ne tuŝas la kernan kaj esencan homecon de la homoj. Oni rimarkas, ke en la kadro de tiu aŭ alia nacio homoj kun tute malsimilaj religiaj aŭ politikaj kredoj sukcesas kunvivi pace kaj harmonie: ĉar la komuna nacia lingvo ebligas tion al ili. Ni scias, ke ankaŭ en la kadro de nacio la komuna nacia lingvo ne ĉiam solvas ĉiujn tiajn problemojn, sed ĝi faciligas la solvon, kompare kun similaj inter-naciaj problemoj. La esperantistoj spertis kaj pruvis, ke homoj de la plej diversaj nacioj, kun la plej diversaj kredoj, povas kunlabori kaj kunveni sur neŭtrala bazo, en reciproka tolero, ĉar komuna internacia lingvo tion ebligas al ili. Interparolante sian komunan lingvon, la esperantistoj penetras preter la tute supraĵajn interhomajn diferencojn, kaj atingas la komunan homecon de la alinaciaj homoj. Ĉar ilia lingvo estas neŭtrala kaj regula, la esperantistoj interparolas sur bazo de lingva egaleco; neniu sentigas per sia misa prononcado aŭ kripligita stilo tiun „fremdecon”, kiun apenaŭ povas eviti fremda parolanto de nacilingvo, kiel ajn sperta, kaj kiu nepre forpelas la *naturecon* de la konversacio. Ĝuste tio estas la ĉefa forto de Esperanto, kiun du teruraj mondmilitoj ne sukcesis detruiri kaj kiu estas, kontraŭe, hodiaŭ pli forta ol iam ajn. La homoj deziras interkompreniĝi. La aluditaj du mondmilitoj, kaj speciale la terura fina eksplodo de la dua, konvinkis la vastajn tavolojn de la popoloj, ke ili devas kunlabori aŭ morti.

La homoj deziras interkompreniĝi. Kaj eĉ tiuj, relative malmultaj, kiuj studadis fremdan lingvon en la lernejo aŭ per hejlmstudado, trovas en la praktiko, ke per fremda nacilingvo ili neniam sukcesos rompi la barilojn lingvajn; tiaj homoj sin turnas kun entuziasmo al la Internacia Lingvo, genia kreaĵo de L. L. Zamenhof, kaj trovas, ke ĝi perfekte plenumas la rolon al kiu ĝi estis de la komenco destinita: la rolon de komprenilo internacia. Ĝi malfermas por ili la pordojn de la mondo. Ili tuj povas kontakti senpere kun homoj en la tuta mondo; interhomaj diferencoj ekhavas sian ĝustan proporcion; la esenca Homo triumfe trabrilas.

La esperantistoj ne estas revuloj. Sed por ili la 15a de decembro estas ilia ĉiujara festotago; en tiu tago ili pensas serioze pri sia afero, kaj pri la homo, kiu per sia sindono kaj talento ebligis la miraklon, kiun ili travivas.

Tiu tago estas ankaŭ la Tago de la Libro, kiun la esperantistoj, laŭ la iama sugesto de poeto Julio Baghy, dediĉas al la originala literaturo de Esperanto. Sur alia paĝo vi trovos artikolon de veterano I. Gomes Braga, speciale dediĉitan al tiu temo.

William Auld

LATAGO DE LA HOMAJ RAJTOJ

La 10-an de decembro 1948 la Ĝenerala Asembleo de U.N. akceptis en Parizo la *Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj*. Tiu grava dokumento havas grandan juran kaj moralan valoron por ĉiu homo, kiu amas la liberecon kaj progreson. Specialan signifon ĝi havas por UEA, kiu en sia *Statuto akcentas, ke „la respekto de la Homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo”*.

Certe multaj Esperanto-societoj kaj grupoj tra la mondo memorigos tiun tagon aŭ per aparta aranĝo aŭ en kunligo kun la festo de la Zamenhof-tago.

La Deklaracio havas 30 artikolojn. En la unuaj tri artikoloj estas konfirmita la principo pri libereco, egaleco kaj frateco de ĉiuj homoj.

La art. 4—15 pritraktas la logikajn sekvojn de la principoj proklamitaj en la unuaj 3 artikoloj: malpermeso de sklaveco aŭ servuteco; malpermeso de torturoj aŭ nehumanaj punoj; rajto je jura personeco; k.s.

Pliaj 6 artikoloj pritraktas la rajtojn kaj liberecojn de la homo sur apartaj kampoj.

La art. 21 parolas pri la pure politikaj civitanaj rajtoj. Estas proklamita la principo, ke la aŭtoritato de la ŝtata potenco devas kuŝi sur la libera volo de la popolo.

La art. 22—28 rilatas al la modernaj liberecoj kaj rajtoj. Ili proklamas la rajton je socia sekureco, el kiu sekvas la rajtoj al laboro, al egala kompenso por egala laboro, al organiziĝo en laboristaj sindikatoj, al ripozo, k.s.

Fine, la art. 28—30 rekonas la rajton de la homo al tiaj sociaj kaj internaciaj ordoj, en kiuj la proklamitaj rajtoj kaj liberecoj povos trovi sian plenan realigon.

La *Universala Deklaracio* ankoraŭfoje rekonas la esencan egalecon de la homo. Ĝi estas simbolo de la tuthomeco kaj universaleco de la mondo, kiu estas proprajo de la homo, super ĉiuj landlimoj, haŭtkoloroj, [lagoj kaj konvinkoj.

I. L.

BAZAJ PRINCIPOJ DE INFORMADO PRI ESPERANTO

La semajno en Frostavallen, pri kiu raportis „Esperanto” en la oktobra numero, pritraktis ankaŭ la ĉefajn problemojn de la Movado: informado, instruado, organizo, kulturaj demandoj. Pri la branĉo informado okazis diskuto la 30-an de julio surbaze de tezoj, antaŭe disdonitaj al ĉiuj partoprenantoj. La diskuton ĉeestis 80 personoj el 15 landoj. La Informa Fako de UEA jam diskonigis la rezultojn de la diskuto al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kaj al la kunlaborantoj de sia Informa Fako. Por ke la tuta membraro kaj precipe la personoj, kiuj aktivis sur la kampo de informado, konatiĝu kun la bazaj principoj akceptitaj de la kunveno en Frostavallen kaj sugestitaj kiel gvidaj por la tuta informa laboro de la Movado, ni publikigas la tezojn kun ĉiuj kompletigoj, faritaj de la kunveno:

I Celo

1. *Tri branĉoj de aktivecoj*: Informado; Instruado; Praktika utiligo. Nur paralela, bone studita kaj celkonscia agado sur la tri kampoj povas doni kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro.

2. *La celo de la informado*: a) diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion kio estas kreita en ĝi aŭ pere de ĝi; b) detruu la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo; c) instigi al lernado de la lingvo kaj altiri novajn adeptojn al la movado.

II Nuna Stato

3. *Fondiĝo*: UEA refondis sian prop. fakon en Bournemouth (1949), transformis ĝin en Informan Fakon (I.F.) en Parizo (1950) kun Gazetara Servo (1950) kaj Kongresa Gazetara Servo (1950). Sekvis reorganizado aŭ organizado de la landaj informaj fakoj.

4. *Rezultoj*: Ĉiujare krom por 1954, estis publikigataj la rezultoj de informado en mondaj kadroj en „Esperanto”. La rezultoj por la jaro 1955 estas publikigitaj en la jul/aŭg. numero de „Esperanto” 1956 kaj ili montras kontentigan progreson, sed ankaŭ bezonon pri plua ampleksigo kaj kvalita plibonigo.

III Organizo

5. *Informa Fako de UEA* (gvidata de la Ĝenerala Sekretario):

a) *Gazetara Servo*: 1) Bulteno kun novaĵoj (en Esperanto por la landaj I.F.; en la angla kaj franca por la grandaj pres-agentejoj kaj por la ĉefaj gazetoj en landoj sen movado); 2) Fotoservo; 3) Artikola Servo; 4) Radio-Servo; 5) se eble, Televida Servo.

b) *Kongresa Gazetara Servo*: 1) Bulteno kun novaĵoj en Esperanto kaj nacilingve; 2) Fotoservo; 3) Artikola Servo; 4) Radio-Servo; 5) se eble, Televida Servo.

c) *Ekspozicioj*: 1) Organizado de la Universala Ekspozicio en diversaj landoj kaj konstanta kompletigado de la materialoj; 2) sugestoj rilate organizon de aliaj ekspozicioj laŭ la modelo de la universala.

d) *Afiŝoj kaj flugfolioj*: Prizorgado de tekstoj kaj taŭgaj desegnaĵoj; eventuale eldonado en diver-

saj okazoj kun internacia karaktero.

e) *Filmoj, Radio, Televido*: Sugestoj al landaj I.F. pri utiligo de tiuj rimedoj.

f) *Prelegvojaĝoj*: Organizo pere de la landaj asocioj kaj vasta utiligo por informado pere de gazetoj, radio, afiŝoj k.s. laŭ la cirkonstancoj.

g) *Gazetaraj Konferencoj*: Utiligo de ĉiu pli grava evento por aranĝo de gazetaraj konferencoj.

6. *Landaj I.F.* (gvidataj de malgranda komitato aŭ de komisiito): Organizati la samajn branĉojn laŭ la modelo de la I.F. de UEA kun adapto al la landaj cirkonstancoj.

7. *Lokaj I.F.* (gvidataj de komisiito aŭ malgranda komitato): Organizo laŭ la modelo de la landa I.F. kun adapto al la lokaj cirkonstancoj.

IV Funkcioj

8. *I.F. de UEA*: a) Harmoniigo de la tuta laboro; b) rekta informado al internaciaj instancoj kaj en regionoj sen movado; c) konsiloj kaj helpo per liverado de informoj, artikoloj kaj materialoj al la landaj I.F. kaj al la rektaj kunlaborantoj en landoj sen movado.

9. *Landaj I.F.*: a) realigo de la sugestoj de la I.F. de UEA; b) organizo de la informado sur siaj teritorioj; rekta informado al tutlandaj instancoj; c) konsiloj kaj helpo al la lokaj I.F. per liverado de artikoloj, novaĵoj, flugfolioj, afiŝoj kaj aliaj materialoj.

10. *Lokaj I.F.*: a) Realigo de la konsiloj de la landaj I.F.; b) rekta informado al la loka kaj regiona publiko.

V Metodoj

11. *Diversaj eblecoj*: a) Artikoloj; b) Mallongaj informoj, nepre objektivaj, sendataj kun absoluta reguleco al la gazetaro; c) Organizata sendado de leteroj al gazetoj, kiuj havas la rubrikon „leteroj de la legantoj”; d) Publikaj prelegoj por ĝenerala publiko; e) Prelegoj en specialaj medioj (sciencaj institucioj, literaturaj societoj, sindikatoj, studentaj kluboj, diversaj asocioj ktp.); f) Radio-prelegoj kaj informoj; g) Afiŝoj; h) Flugfolioj; i) Sloganoj; j) Ekspozicioj; k) Filmoj; l) Varbado de Apogantoj de UEA; m) Ĉiaspecaj tradukoj, ankaŭ de literaturaj lingvoj, en naciajn lingvojn nepre kun la mencio „tradukita el Esperanto”; n) Pli efika disdonado de la 6-lingva flugfolio de UEA en la internaciaj neesperantistaj kongresoj (UEA tiucele regule informados la landajn asociojn pri la okazantaj kongresoj); o) Partopreno de esperantistoj-fakuloj en la fakaj kongresoj kaj efektiva uzo de la lingvo en tiuj kongresoj; p) Aliaj eblecoj laŭ la landaj aŭ lokaj cirkonstancoj, ekzemple eldono de unu numero, precipe komence de la kursoj, de la nacia Esperanto-gazeto tute en nacia lingvo kaj ĝia vendado ankaŭ en gazetvendejoj, aŭ aldono al landaj Esperanto-gazetoj de samformataj murafiŝetoj kun nacilingvaj informoj pri Esperanto por pendigi en

kunvenejoj de diversaj organizaĵoj.

12. *Nur intensa utiligado de ĉiuj eblecoj paralele efikas pozitive.*

VI Kvalito

13. *Ĉefaj eraroj:* a) Nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k.s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ *La Internacia Lingvo* aŭ *Esperanto*; b) superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo; c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili; d) uzi en nacilingvaj tekstoj esperantajn esprimojn, ekz. „samideano“, „Majstro“, „verdstelanoj“ k.s.; e) skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo; f) nomadi la informadon pri Esperanto „propagando“; g) doni al la Esperanto-Movado sektectan karakteron (tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k.s.).

La eraroj en la informado malproksimigis de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzis fortan kompromitiĝon de la movado en multaj medioj.

14. Por altigi la kvaliton estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturan kaj praktikan valorojn de la lingvo: literaturo, sciencaj verkoj, ISU, Belartaj konkursoj, delegita reto. precipe helpo dum vojaĝoj kaj en profesia laboro. *La digno de ĉiuj publikaj aranĝoj respegulu la respekton, kiun la esperantistoj mem havas por la Internacia Lingvo.*

Rimarko de la kunveno: Akcenti la celon de la Movado: nacia lingvo por naciaj rilatoj, la Internacia Lingvo por internaciaj. Akcenti plue, ke ne temas pri forigo de la naciaj lingvoj sed pri solvo de la lingva haoso en la internaciaj rilatoj. Oni povas, kompreneble, nomi Esperanton „dua lingvo por ĉiu“, same kiel, se necese, „konscie kreita“ aŭ „plannita“ lingvo, ne forgesante, ke konsciaj elementoj estas troveblaj ĉiam pli ankaŭ en la naciaj lingvoj. Akcenti ankaŭ, ke Esperanto signifas protekton de la naciaj lingvoj kaj kulturoj, precipe de la malgrandaj nacioj.

VII. Konstanteco kaj Kampanjoj

15. *Konstanteco:* La Informado devas esti konstanta dum la jaro, por ke la publiko senĉese konsciu pri la ekzistado kaj funkciado de Esperanto.

16. *Kampanjoj:* Specialaj kampanjoj, kun utili-

go de ĉiuj metodoj, devas esti farataj antaŭ la komenciĝo de la kursoj, okaze de kongresoj, je la Zamenhof-tago kaj ĉiam kiam por tio prezentiĝos taŭga okazo.

17. *Sepdekjara datreveno de Esperanto:* En 1957 prezentiĝos taŭga okazo por grandstila monda kampanjo dum unu monato, fiksota interkonsente.

18. *Centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof:* La 15-a de decembro 1959 devos esti solene festata en la tuta mondo kaj la preparlaboroj por tiu manifestacio devos komenciĝi almenaŭ unu jaron pli frue.

VIII Medioj atingotaj

19. *Generala Informado:* Ĝi estas direktita al la larĝa publiko kaj havas la celon krei ĝeneralan favoran agordon.

20. *Speciala Informado:* Ĝi estas direktita al specialaj medioj, kies interesoj transiras la limojn de iliaj naciaj lingvoj (sciencistoj, diversaj fakuloj, komercistoj, membroj kaj adeptoj de internaciaj organizaĵoj kaj movadoj) kun precipa atento al la junularo kaj al la studentoj.

IX Konkludo

21. La Esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la praveco de la propra afero kaj pli kuraĝe argumentu kontraŭ la eraraj prezentoj. Ĉiu esperantisto konstante klopodu larĝigi kaj altigi sian lingvan scion. Ĉiu esperantisto ĉiam portu la Esperantan insignon (ne multajn, sed unu). En fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj la esperantistoj levu sian voĉon. La informado estu ĉiam adaptita al la medio, en kiu oni faras ĝin, kaj venu prefere de tiu medio mem.

22. Ĉiuj branĉoj de informado estu egale atentataj kaj paralele aplikataj. La maniero de informado varias de unu lando al la alia kaj de unu medio de la alia. Sekve, tiuj ĉi bazaj principoj estu aplikataj kun elasteco kaj kun konsidero de la apartaj cirkonstancoj.

23. La tuta agado, paralela kaj harmonie kunordigita en la tuta mondo, havu daŭre la celon diskonigi la lingvon, instigi al lernado kaj praktika aplikado de Esperanto, venki la ŝlosilajn poziciojn en la kultura vivo kaj definitive favorigi la publikan opinion al Esperanto.

I. L.

Internacia sportkonkurso de Esperantistaj lernejoj

S-ro Oldrich Schwetter, instruisto de gimnastiko kaj gvidanto de lerneja Esperanto-rondeto ĉe okjara mezlernejo de Klement Gottwald en Dolni Bludovice, Ostrava, Ĉeĥoslovakio, organizis okaze de la Internacia Tago de Infanoj, la 1-an de junio 1956, internacian malpezatletikan konkurson „je malproksimo“.

Partoprenis 9 knabaj kaj 5 knabinaj teamoj, el jenaj lernejoj: Temple Boys' School, Rochester, Anglujo; Pestalozzi-

schule, Freital, Germanujo; Pecs-Gyarvarosi allami altalano iskola, Pecs, Hungarujo; Ormosbanyai allmi altalano iskola, Ormosbanya, Hungarujo; Lernejo Nguyen Trai, Hanoi, Vjetnamo; Knabina Liceo Trung Vuong, Hanoi, Vjetnamo; Lernejo Chu Van An, Hanoi, Vjetnamo; Lernejo Nguyen gia Thieu, Hanoi, Vjetnamo; Lernejo Pho Thong Cap 3, Hanoi, Vjetnamo; Osmileta stredni skola Klementa Gottwald, Dolni Bludovice, Ĉeĥoslovakio. Aliĝis ankaŭ Hain Hu mezlernejo, Shanghai, Ĉinujo, sed bedaŭrinde la rezultoj ne alvenis ĝustatempe.

Konkursoj por la knaboj estis: kurso 60 m; longsalto; jeto de kriketpilketo; kaj por la knabinoj okazis same sed aparte.

Inter la knabaj teamoj venkis Temple Boys' School, Anglujo kun 1,082 poentoj; inter la knabinaj Pestalozzischule, Germanujo, kun 1,097 poentoj. Plej alt-potentitaj individuoj estis (knabo) W. Dressler, Germanujo kaj (knabino) G. Lehmann, Germanujo.

La konkurso vekis grandan intereson. En lernejo Klement Gottwald la rezultoj estis tuj post ricevo tradukitaj kaj elsenditaj pere de la lerneja disaŭdigilo.

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono ARNold 90-81

ESPERANTO EN EDUKADO

Sinjoro David Kennedy, la kunlaboranto de CED por lernejoj aferoj, ĵus finis la grandan enketon pri Esperanto en la lernejoj en la jaro 1955—1956. La enketo estis farita sub tri sekcioj: A. nomoj kaj adresoj de instruistoj pretaj instrui Esperanton en la lernejoj; B. lernejoj, en kiuj en 1955—1956 oni instruis la lingvon kaj; C. opinioj esprimitaj de kelkaj instruistoj en tiuj lernejoj koncerne la instruadon de Esperanto.

Al la unua demando entute respondis 457 geinstruistoj el 35 landoj. Tio signifas, ke entute 457 geinstruistoj estas pretaj instruadi la lingvon, se por tio montriĝos bezono. Estas tute certe, ke troviĝas ankoraŭ multaj instruistoj, kiuj estas pretaj fari la saman. Bedaŭrinde ili ne respondis al la enketo kaj tial ne povis esti enkalkulitaj.

Laŭ la respondoj ricevitaj al la dua demando, montriĝas, ke en la lerneja jaro 1955—1956 Esperanto estis entute instruata en 148 lernejoj el 23 landoj. Jen la statistiko laŭ la landoj: Aŭstrujo (3), Ĉeĥoslovakujo (2), Francujo (18), Hungarujo (1), Jugoslavio (54), Maroko (1), Novzelandoj (1), Svislando (3), Belgujo (1), Danlando (2), Germanujo (9), Italujo (9), Kanado (1), Meksikio (1), Norvegujo (3), Usono (2), Britujo (17), Finnlando (3), Hispanujo (1), Japanujo (3), Kanariaj Insuloj (1), Nederlando (11), Pollando (1).

Entute 37 instruistoj el 15 landoj respondis al la tria demando. La ĉefaj komentoj rilatas al gramatiko, efiko al lernado de aliaj objektoj, korespondado.

Gramatiko: Generale la lernantoj trovas la Esperanto-gramatikon pli simpla ol la nacian. Laŭ la komentoj, la instruado de Esperanto helpas la lernantojn pli bone kompreni la propran nacian gramatikon ĉar ili povas kompari. La lernado de la Esperanto-gramatiko estas utila precipe al infanoj kies nacia lingvo malsimilas la okcidenteŭropajn lingvojn. Juĝante laŭ la respondoj, la ĝenerala opinio estas, ke la instruado de Esperanto per la rekta metodo estas preferinda por la pli junaj lernantoj, dum la gramatika metodo pli taŭgas al instruado de gimnazianoj.

Efiko je aliaj objektoj: La spertoj pri la efiko de la Esperanto-instruado je la lernado de historio estas tre limigitaj. Tamen oni kredas, ke la Esperanto-korespondado, kaj la legado de fremdlandaj Esperanto-gazetoj vekas ĉe la lernantoj intereson pri la historio de aliaj landoj. Male, la efiko al instruado de geografio estas pli klara. La natura scivolemo de la lernantoj pri la lernantoj en aliaj landoj instigas ilin

serĉi informojn pri siaj Esperanto-korespondantoj. La legado de esperantlingvaj gazetoj kaj revuoj havas percepteblan efikon je la lernado de geografio. La interŝanĝo de geografia materialo, ekzemple bildkartoj, poŝtmarkoj, ilustritaj broŝuroj kaj simile plivigligas la intereson de la infanoj dum la geografia leciono. Tre grava estas la efiko de la lernado de Esperanto je la lernado de aliaj fremdaj lingvoj. La lernado de Esperanto donas bonan enkondukon al la fonetiko, logiko kaj gramatiko de aliaj lingvoj. Per la lernado de Esperanto la infanoj akiras facilan normon por kompari la diferencojn inter la propra lingvo kaj la fremdaj naciaj lingvoj. Laŭ la ricevitaj komentoj, oni povas sendube konstati, ke la lernado de Esperanto tre bone efikas je la lernado de la propra nacia lingvo.

Korespondado: La interkorespondado estas unu el la plej fruktedonaj rezultoj de lernado de Esperanto. Kelkaj instruistoj kontrolas (ne verkas) la korespondadojn de siaj lernantoj supozante ke la individua korespondado sen instruista kontrolo ne daŭros, sed aliaj preferas lasi al la infanoj plenan liberecon, eĉ fari erarojn! Unu el la rezultoj de korespondado estas, ke la infanoj de unu lando ekkomprenas, ke la infanoj de aliaj landoj estas similaj al ili, eĉ tute samaj. Tre ofte kreiĝas fortaj amikecaj sentoj inter la korespondantoj de diversaj landoj.

Laŭ pluraj komentoj, ankoraŭ ekzistas malfortaj flankoj de la lerneja interkorespondado. Tre ofte al sendita poŝtkarto aŭ letero venas neniam respondo, kio signifas malkuraĝigon por la sendinto. Cetere, la poŝtelspezoj estas sufiĉe granda malhelpo, ĉar tro altaj, precipe kiam temas pri korespondado inter tre malproksimaj landoj kaj oni devas utiligi aerpoŝton.

Jen kelkaj aliaj interesaj komentoj: mankas taŭgaj lernolibroj por infanoj; unu periodo de instruado en la semajno ne sufiĉas; por plene sukcesi, la instruado estu deviga; mankas bildoj kaj filmoj kun teksto en Esperanto. La ĉefaj faktoroj, kiuj negative influas la lernadon de Esperanto, estas la jenaj: malkuraĝigo de la lernantoj kaŭzita de mokaj rimarkoj de instruistoj en la lernejo; nuna konkurenco (ofte ne bona) de la rusa lingvo; gepatra kredo je la granda prestiĝo de la naciaj lingvoj kun sekva malsimpatio al Esperanto. Por venki tiujn negativajn faktorojn pluraj enketitoj sugestis: gajni la intereson de la gepatroj per Esperanto-ekspozicio, prelegeto, montrado de korespondadoj kun aliaj landoj kaj simile. Estas bone ankaŭ substreki la fakton, ke ekzistas multaj denaskaj esperantistoj kaj ke ili posedas la idealan dulingvismon. La instruisto devas montri al la gepatroj la grandajn kulturajn valorojn, kiujn entenas Esperanto.

CED dankas al s-ro David Kennedy pro la grandega laboro, kiun li faras. Ĝi ankaŭ dankas ĉiujn geinstruistojn, kiuj respondis al la enketo. S-ro David Kennedy faros similan enketon ankaŭ por la studjaro 1956—1957. Espereble al la ĉi-jara enketo respondos ankoraŭ pli granda nombro da geinstruistoj. La rezultoj de la enketo estos komunikitaj al UNESKO kaj al ĉ. 200 internaciaj institucioj kaj organizaĵoj, kiuj regule ricevas la dokumentojn de CED. Ili servos ankaŭ kiel bazo por la nunaj kaj estontaj klopodoj rilate la plivastigon de instruado de Esperanto en la lernejoj.

Alvokoj

La Veterana Esperantista Klubo intencas kompili registron de Esp. organizaĵoj (klubo, societoj, ktp), kiuj havas daŭran ekziston de pli ol 40 jaroj. Sekretarioj kaj prezidantoj estas petataj informi la sekretarion pri la precizaj nomoj kaj fondiĝjaroj de tiaj organizaĵoj. La listo komenciĝis per la Londona, Glasgova kaj Edinburga kluboj, fonditaj en 1903.

Samokaze oni anoncas, ke la registro de niaj Veteranoj estas nun reviziata, kaj nova eldono aperos frue en 1957. Veteranoj de pli ol 40 jaroj, kiuj interesiĝas aliĝi aŭ fari adresŝanĝojn, estas

petataj sendi la koncernajn informojn: titolo, nomo, adreso, naskiĝjaro, jaro de esperantistiĝo, foto (laŭplaĉe), vivokuro (laŭplaĉe).

Adreso: S-ro M. Lewin, 33 Kingscroft Avenue, DUNSTABLE, Beds., Anglujo.

La Internaciaj Labor-Tendaroj estas grupoj da junuloj, kiuj dediĉas tempon al feria laboro ĉie, kie ekzistas por tio bezono. Tradicie oni starigas grupon por helpi al rekonstruo post katastrofo, kiel ekzemple post la inundo en Nederlando, sed ankaŭ en aliaj tempoj kaj lokoj oni laboras. Malmulte da esperantistoj povas serioze agi en tiu ĉi limigita sfero: des pli necesas, ke ĉiu sin registru, por ke estu

eĉ plej malgranda rondeto ekzistanta en bona momento por efektiva kaj efika ekago. Oni sin turnu al Thomas J. Woodall, I.V.S.P., 19 Pembridge Villas, London W.11.

Universala Kongreso 1958

Grupoj, kiuj intencas inviti al sia urbo la *Universalan Kongreson de Esperanto 1958*, bonvolu anonci sin al la *Administra Oficejo en Rotterdam*, se eble antaŭ la *fino de decembro 1956*. Informojn kaj la kongresan demandaron oni povas ricevi ĉe la A.O.

Denaske Nia!

Ĉu vi neniam forlasis tiun ideon pri lingvo internacia? — demandis mia afabla vizitanto rigardante libroŝrankon en mia biblioteko.

— Ne; ĝi donas al mi ĉiam kreskantan plezuron, ĉar mi estas legema.

— Vi povus tamen legi en multaj aliaj pli gravaj lingvoj, ĉu ne?

— Ne la samajn librojn; ne ĝui la saman universalecon, ĉar eĉ la plej grandaj literaturaj lingvoj de la pasinteco estis unue lokaj parolmanieroj kaj nur pli poste disvastiĝis: en ili restas ĉiam la limoj geografiaj kaj tradiciaj, dum en la internacia lingvo aperas la pensoj de la homaro, sen ia limo...

Ĉu vi ne devus diri *aperos*?

— Ne; esploru la devenojn de la verkoj en ĉi tiu ŝranko: ilin oni verkis kaj presis en la plej diversaj landoj de la mondo; ekzemple: tiuj ĉi tri volumoj eldonitaj en Kanariaj Insuloj. „*Kvaropo*” estas bela poemaro verkita en Skotlando; „*El la Maniko*” estas novelaro ankaŭ de skoto; „*Koko Krias Jam*”, bela rakontaro verkita de hungaro loĝanta en Svedujo. Ĉi tiuj estas la volumoj 1, 3, 4 de la Bel-Literatura Eldon-Serio „*Stafeto*”...

— Ĉu vi ne havas la duan volumon de la serio?

— Ĝi ne apartenas al ĉi tiu ŝranko; ĝi estas tradukaĵo.

— Ĉi tie estas kolekto nur de originalaĵoj?

— Jes; vidu mem. „*Retoriko*” estas bonega kurso pri oratorarto; ĝi taŭgas por ĉiuj lingvoj, sed estas originale verkita en Esperanto. La aŭtoro estas jugoslavo loĝanta en Anglujo kaj la libro estis eldonita en Francujo. Jen aliaj verkoj de li: „*Aktualaĵaj Problemoj*” estas facile komprenebla instruado pri la internacia juro, agrable verkita, oni legas ĝin kvaŝaŭ romanon. „*La Lingvo Internacia*” estas dokumentaro pri Esperanto.

— Kia bela volumo pri...

— Pri ĝardenplantoj. „*Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj*” estas eminenta scienca verko de mondfama specialisto... Vidu la bildojn, tiujn vi komprenos...

— Ja, tre belaj... Alia bela volumo, „*Originala Verkaro*”...

— Ĝi estas klasikaĵo tre ŝatata. Ĝin verkis la aŭtoro mem de Esperanto. Rigardu ankaŭ la du volumojn „*Leteroj*” de li verkitajn. Ĉi tiuj tri volumoj estas trezoro por la esperantistoj, pro la modela stilo.

— „*Himnaro Esperanta*”; ĉu religia verko?

— Mi ne scias, ĉu ĝi estas vere religia; la esperantistoj estas tre kantemaj kaj posedas kantojn pri ĉio...

— Jen tria volumo de leteroj de via Majstro!

— Ne; tiujn ĉi leterojn verkis Lanti, socialisto, ĝismedola esperantisto, al kiu ni multon ŝuldas; sed li ne estis nia majstro.

— „*Saltego trans Jarmiloj*”, „*Stranga Heredaĵo*”, „*Premiaj Romanetoj*”, „*Tri Angloj Alilande*”, „*Tria Rapsodio*”, „*Verda Koro*”, „*Vivo vokas*”...

— Sed atentu pri la devenoj, ĉi tio tre gravas...

— Mi atentas, sed nenion de mia lando mi vidas!

— Vi kulpas do! Kial vi, talenta verkisto, ne verkas en Esperanto? Sed por konsoli vin jen du libroj verkitaj kaj eldonitaj en nia urbo: „*Veterano*” estas mia, kaj „*Ivan la VI-a*” estas bela tragedio en versoj de Geraldo Mattos. Tre magra estas ĝis nun nia kontribuo por la originala biblioteko de la homaro... Ni ĉefe tradukis. Ni estas en la komenco, la celo en malproksimo...

— „*Miru, Pensu, Ridul*”...

— Tre grava verko pri ĉio! Tre riĉa lingvo... La aŭtoro mortis antaŭ nelonge...

— „*Monumento de Carlo Bourlet*”...

— Tiu ĉi estas klasika verketo. Mi mem ĝin kompilis. La aŭtoro mortis en 1913. Ankaŭ la aŭtoro de „*Jarmiloj pasas*” jam mortis...

— Ĉu estas multaj mortintaj aŭtoroj de originalaĵoj?

— Jes; kaj ĝuste ili estas nia forto. Aŭgusto Comte diris, ke ĉiam pli kaj pli la mortintoj regas la vivantojn tra siaj ekzemploj. Ni jam havas tiun tradicion; la verkoj de geniaj mortintoj estas respektinda heredaĵo.

— Tiu ĉi estas vortaro, ĉu ne?

— Jes, *Plena Vortaro de Esperanto*, uzata kun amo tra la tuta mondo. La aŭtoroj E. Grosjean-Maupin, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld jam mortis por la mondo, sed restas niaj porĉiamaj majstroj. Nur la kvara vivas kaj ĵus preparis bonegan suplementon por la vortaro.

— *Plena Gramatiko, Kompleta Gramatiko, Du Malsanoj*...

— Tiuj estas verkoj de ĝisfunduloj. Ili ne lasas nin en paco! Gramatikemaj homoj, kiujn mi tre timas!

— *Historio de Esperanto, Vivo de Zamenhof*...

— Tiuj estas modele belaj verkoj de Edmond Privat! Lernu Esperanton nur por legi ilin. Sed nun, kara amiko, ni devas obei la servistinon, kiu vokas por vespermanĝo. Poste ni vidos la ceterajn bretojn de ĉi tiu ŝranko; dum la manĝo vi paciencu aŭskulti mian babiladon.

La ceteraj lingvoj naskiĝis el la buŝoj de analfabetoj kaj nur post jarmiloj de nur buŝa uzado ekkreis literaturon; tial ili ne estas literaturaj lingvoj, sed nur pene kaj tute malregule uzataj por literaturaj celoj. Iliaj malprecizeco, malreguleco estas eterna turmento por la verkisto. Tute kontraŭe, la lingvo internacia naskiĝis el libroj kaj kreskadas en libroj, tial ĝi estas la unua literatura lingvo en la mondo. Ĝi estas denaske literatura lingvo kaj vekas entuziasmon en la koroj de la verkistoj...

— Mi vidis neniun tradukon de fama verko inter tiuj libroj. Ĉu la esperantistoj ne tradukas la gravajn verkojn de la mondliteraturo?

— Memkompreneble ili tradukas ĉion el novaj kaj malnovaj lingvoj; sed ni rigardis nur la ŝrankon de originalaj verkoj. Poste ni vidos la duan.

— Do ĉiuj volumoj en tiu ŝranko estas originale verkitaj en Esperanto?

— Jes; tiuj libroj ne ekzistas ankoraŭ en aliaj lingvoj; tiujn pensojn de la moderna homaro posedas nur la esperantistoj tra la mondo. Ĝi estas *nia* literaturo; ĝi estas *denaske nia*.

— Sekve, la esperantistoj kreas nun la unuan mondliteraturon, la unuan sen geografiaj limoj?

— Senlima, senpartia, senrasa, sen... antaŭjuĝoj, sen fanatikismo, aŭ, se vi preferas, kun ĉiuj pensoj pri landoj, rasoj, religioj, partioj, ideoj; ĉar la neŭtraleco de nia movado ne estas negativa, ĝi estas pozitiva: ĝi permesas al ĉiuj fari ĉion; kaj la leganto de nia literaturo estas informata pri ĉio, el ĉiuj vidpunktoj.

— Tio ŝajnas al mi tute nova, senbrida, senbara...

— Jes: „En la mondon venis nova sento”. Ekaperis la sento de tuthomara interdependo, de tut-

monda solidareco, de mondskala kunlaborado, de unu mondo kaj unu loĝantaro...

— Vole-ne-vole ni vivas en la tempo de radio, televido, de rapida aviado, kaj jam ne povus resti enfermitaj interne de la muroj de la antikvaj urboj, aŭ en la kavernoj de primitivuloj. La homaro estas devigata agnoski la malgrandecon de nia planedo...

— Kaj mi ne komprenas, kara amiko, kiel vi povas vivi sen lingvo internacia, enfermi vian menson en la striktaj limoj de du-tri okcidentaj lingvoj, kiuj rediras ĉiam la samon kaj restas en la gloraj tempoj de Romo kaj Ateno, nenion konante de la mondo.

— Vi pravas; por intelektulo lingvo internacia jam estas vivebezono. Sed ĝis antaŭ du horoj mi ne konsciis pri la ekzisto de lingvo internacia. Nur via biblioteko ri-

velis al mi tiun ekziston, kiun la propagando de la esperantistoj paradokse kaŝas: en ilia propagando aperas „projekto” de estonta, ne estanta, lingvo internacia. Al mi ŝajnas, ke vi ĉiuj uzas propagandan materialon de la pasinta jarcento: vi rediras malnovajn frazojn, kiuj trompas la publikon. Via tekniko estas paseismo.

— Vi pravas. Ni tro parolas pri registaraj estontaj decidoj, pri estonta enkonduko de la lingvo en la lernejojn de ĉiuj landoj, kaj ne scipovas reliefigi, ke per 69-jara laborado de miloj kaj poste dekoj kaj centoj da miloj da talentaj homoj tra la mondo, la iama projekto jam fariĝis bela realaĵo, eminenta kulturlingvo de la homaro, en plena funkciado parole kaj skribe. Nia propagando estas en 1887, dum ni jam vivas en 1956!...

Ismael Gomes Braga

Anslavs Eglitis

Kristnaskdonaco

Tradukis: Krišs Smilga

En la mezo de Ŝvabio leviĝas montaro Alboj. En la mezo de la montaro, en mallarĝa valo, staras la vilaĝo Pfiferlingen. Dum vintro super Alboj blovas fortaj ventoj. Precipe forte ili blovas tra la valo de Pfiferlingen. La pintoj de la montaro baras la vojon, direktas ilin en la funelforman valon, kaj en la malvasta fino, kie troviĝas Pfiferlingen, ili fajfas kaj ehas furioze. Ĝis nun neniu vidis tiel fortan ventegon, kiel dum tiu ĉi Kristnasko. La facilaj dometoj tremis, tegmentladoj krakadis, fenestrovitroj sonadis, kaj la vilaĝanoj la tutan nokton ne fermis siajn okulojn. Matene la ventego, kiel kutime okazas en montaro, subite haltis, kaj lacaj vilaĝanoj fine dronis en saniga dormo.

Ĉu ĉiuj? Ne. Domposedanton Gotlib Gonser, kiu imagis sin la plej saĝa kaj sprita, la subita silen-

to ne trompis. Li sciis kiel danĝeraj estas la ventegoj de Alboj. Li surmetis la mantelon kaj venis eksteren.

Nebulo kovris la ĉielon, sed la luno ankaŭ tra la nuboj sendis mildan duonkrepuskon super la nekovritan teron, kaj kiam la okuloj alkutimiĝis, oni povis distingi domojn kaj barilojn. La aero ŝajnis varmigita por degelvetoro, kiel ĉiam post ventego. Ĉio ŝajnis en ordo. Neniu arbo estis rompita. Eĉ la akvotuboj ĉe la domoj ne estis fleksitaj. Jes, Gotlib Gonser ne konstruis sian domon neglekte kaj rapidiĝante kiel aliaj. Nenia ventego povis difekti lian domon.

Kontenta, Gotlib Gonser antaŭ reenlitiĝo, rigardis malantaŭ la angulo de la domo en la ĝardenon, kaj restis kun malfermita buŝo — tie kuŝis io granda, malhela. Ne-vole li retiriĝis malantaŭ la angu-

lon. Ĉio restis silenta. Li kliniĝis ankoraŭfoje: la malhelaĵo ne moviĝis. Tio aspektis kiel granda tendo. Sed Gotlib Gonser permesis al neniu konstrui tendon en sia ĝardeno. „Ho, kiu tie?” li ekkriis. Neniu respondis. Li zorgeme faris kelkajn paŝojn antaŭen. Kiel strange en nokta mallumo ĉio aspektis.

„Kia puninda neglekto?” Gotlib Gonser mallaŭte ekkriis, — „kia malzorgo ne fiksi tegmentojn ĉe domoj bone”. Ĉu li ne centfoje jam detale rakontis al ĉiu najbaro, kiel tio estas farinda, kaj kiel zorgeme kaj pripense li faris konstruante siajn domojn? Estis vero — ĝuste tiam, kiam ĉi tiun multe pripensitan aferon li ellernis rakonti flue, neniu plu deziris aŭskulti. Ĉiu peko naskas punon. Kaj nun? Vidu, tegmentoj flugas, danĝerigas socian sekurecon, kaj difektas fremdajn ĝardenojn. Rigardu, kian sulkon la angulo de la tegmento faris, kruciĝante en la teron. Aĉaĵo!

Gotlib Gonser aliris la tegmenton kaj sperte alrigardis. Tio estis tegmento de aŭtomobilejo, aŭ de pli granda kokinstalo. La vilaĝanoj estis pasiaj kokinbredantoj. Gotlib Gonser batis per fingro:

bona zinklado. Sub ĝi bona seka ligno. Dum la malriĉa postmilita tempo — riĉaĵo. Sed malsaĝaj homoj lasas flugi ĝin aeren. Hol Mondo...!

Gotlib Gonser ĉirkaŭiris la tegmenton. Ĝi estis sufiĉe malproksimen fluginta. La najbaraj tegmentoj estis tegolaj, malgraŭ ke li tiel multe rakontis pri la bonaj ecoj de la lado. Gotlib Gonser kviete kalkulis. (Li ŝatis teoriant pensadon.) La tegmento venis de sudokcidento, trans la ĝardenon de najbaro. Ankorau dek paŝoj, kaj ĝi estus koliziŭginta kun lia aŭtomobilejo, sed nun ĝi renversis la barilon de najbaro Maute. Kiel li insultos, kiam matene li elrampos de la lito. Jen vi havu, malsaĝa maljunulo, kristnaskdonacon.

Subite Gotlib Gonser ekfajfis. Kristnaskdonaco? Ĉu ĝi ne estis Kristnaskdonaco por li, kiun la bona Dio lasis en lia ĝardeno? Ladon ne estis eble aĉeti, kaj bona seka lignomaterialo estis maloftaĵo. Gotlib Gonser rigardis ĉirkaŭen. Profunda silento kaj plena soleco, kiel dum Kristnasknokto. Estis verŝajne ĉirkaŭ la kvina horo. En la mateno de la Kristnasko ĉiuj leviĝas malfrue. Gotlib, kviete kaj lerte kiel ombro, englitis en sian aŭtomobilejon, kie pro manko de maŝino, estis nur manveturileto. Li elportis hakilon, segilon, najlotirilon kaj ferrompilon. Rapide, sed zorgeme, li komencis deŝiri la grizajn foliojn de la lado. Ĝi leviĝis sufiĉe facile, se oni scias kiel ŝiri. Gotlib Gonser tion kapablis. Gojante pri sia lerto, li pensadis. Post du horoj, eble jam post unu kaj duonhoro, la tegmento estos derompita, kaj lia aŭtomobilejo plena de bonaj aĵoj. Eble iu diros, ke la tegmento apartenas al iu alia? Malsaĝe, la tegmentoj devas stari ĉe domoj. Nenie estas skribite, ke ili devas flugi aeren Tute kontraŭe, en ĉiu leĝolibro estas skribite, ke ĉio troviĝanta en la ĝardeno de Gotlib Gonser apartenas al Gotlib Gonser. Plie, la perdo de la tegmento estos puno por senzorga konstruo de la tegmento. Neglekto estis afero, kiun Gotlib Gonser malamamis plej forte. Kun zorgema forto li enigis la

rompilon sub la foliojn de lado, kaj la unuaj defalis melodie sonante kaj kuŝigis ĉepiede.


„Bonan matenon, bonan matenon.” Martin Maute nenion demandis. Li subite ekkomprenis, kion faris kaj opiniis Gotlib Gonser, ĉar li kaj ĉiu Pfiferlingano faris kaj pensis same. Martinon ankaŭ ne ofendis la malvarma saluto de la najbaro. Martin estis sinregema kaj konsideris sin la plej

Gonser demandis:

„Sed ĉu vi scias al kiu apartenas la tegmento?”

„Kio troviĝas en mia ĝardeno apartenas al mi, respondis Martin kun moka rideto. „Estas pli bone rapidi anstataŭ babilo.”

Ambaŭ najbaroj kuraĝe, sed silente enigis la rompferon sub la ladon. Sed ne estis derompita la sekvonta folio, kiam eksonis la ordinara ŝvaba matensaluto.



... profunda malĝojo plenigis lian animon ...

saĝa en la tuta strato. Pro tio li nur saĝe ridetis, kaj ŝajne senkulpe trafis demandante:

„Najbaro, kial vi komencis rompi tiun parton de la tegmento, kiu troviĝas en mia ĝardeno?”

„Ĉu vere tiel? Nu mi... volis liberigi vian teron.”

„Ho, kia afableco. Dankon. Sed nun mi ŝiros la feron mem. Ĉu vi ne iru al via angulo? Duope ni sukcesos pli rapide.”

Gotlib Gonser staris momenton hezitante. Argumenti kun najbaro estis senutile. Tio daŭrus almenaŭ ĝis tagmezo. Sed duono de la tegmento, prave, troviĝis en fremda ĝardeno. Estante justema Gotlib

„Bonan matenon. Tiel frue leviĝintaj, kaj kuraĝe ĉe laboro?”

Malbenite. Tiu estis la tria najbaro Konrad Koncelman.

„Tie mi devas helpi,” li duonvoĉe daŭrigis, kaj transrampis la barilon kaj alvenis kun siaj iloj.

„Kio nun?” miris Gotlib Gonser. „Kion vi volas? Sur via tero la tegmento ne kuŝas.”

„Sed vento blovante sudokcidente portis ĝin trans la angulo de mia ĝardeno.”

„Ho. Tiam vi diros, ke ĉiuj kolumboj flugantaj trans vian ĝardenon apartenas al vi, ekkriis Gotlib Gonser tute furioze.

Konrad Koncelman estis sinre-

gema kaj ĝenerale saĝa viro. Li tre bone sciis, ke li estas la plej saĝa en la mallarĝa parto de Pfiferlingen. Li ne respondis abrupte. Li ne furioziĝis. Li nur humile demandis.

„Kiel estus, sinjoroj, se ni ekde- mandus vilaĝestron kion fari?”

Gotlib Gonser kaj Martin Maute alrigardis unu alian kaj ekskuis la kapojn.

„Venu ankaŭ vi. Sed rapide. La mateno ne estas malantaŭ montaro.”

Kaj nun malantaŭ la granda arba barajo, kiu ordinare dividas la ĝardenojn de Pfiferlinganoj, dum tiu ĉi Kristnaskmateno okazis diligenta laboro. Rapide la lado estis derompita kaj dividita en tri egalaj stapletoj.

Nun komencis soni mallaŭte la akraj mansegiloj, diligente dividante la aliajn lignopartojn, simile je tri partoj. Ĉar Pfiferlinganoj ŝatis ordon, ankoraŭ dek minutoj kaj la tegmento estus malaperinta en tri aŭtomobilejojn, kaj la tri viroj returniĝus en varmajn litojn. Sed malfeliĉe, ĉi matene la trian fojon sonis la afabla ŝvaba saluto.

„Bonan matenon. Tiel frue leviĝintaj, kaj diligente ĉe laboro?”

Tiu estis la kvara najbaro Bertold Bicer. La tri segiloj ekmortis en la manoj. La okuloj de tri laborantoj malleviĝis sur la tri stapletojn de ligno.

„Mi ĵus diris al la edzino: tia ventego ne forpasos senakcidente. Mi diris: kedu min, edzinet, estos forrompitaj kelke da tegmentoj. Tiel mi diris al mia edzino.” La laborantoj silentis. Bertold Bicer alvenis, kontrole rigardis la ladon kaj lignon.

„Bona sendifekta ligno kaj bona lado”, li asertis, „tre bone konstruita tegmento. Nur malĝuste fiksita. Vidu — la lignon oni ne povas meti tiel, ĝi devas estis tiel metata. Ĉu vi komprenas?”

„Vi ja ne instruos min konstrui tegmentojn, Bertold,” malickore ekkriis Gotlib Gonser. Ĉar svaboj tre ŝatas instrui aliajn, sed mem ne toleras konsilojn.

„Kiu vivas, lernas vivi”, humile respondis Bertold Bicer. „Sed diru, Gotlib, kial vi segas la tegmenton? La tegmento ne estas

granda, oni povas ĝin porti el la ĝardeno. Je forta viro ĉe ĉiu angulo, kaj unu kun laŭta voĉo, kiu komandas, kaj la afero estus farita.”

La tri segantoj saĝe palpebrumis unu la alian. Prudentaj homoj Bertoldon ne estimis. Lia domo estis la plej malgranda kaj eĉ sen aŭtomobilejo. Kokinojn li ne havis, bieron drinkis kaj kartojn ludis. Eĉ dum grand-germania epoko de Hitler li havis nenian oficon. Bertold ne povis defendi sian bonon kaj estis malsaĝulo. Oni ne devis doni parton al li. Pro tio, tute ne respondante al la malsaĝaj demandoj, ili relaborigis la segilojn.

Post momento Bertold Bicer diris: „Gotlib, ne trasegu la malantaŭan kadron. Tiam ĝi ne estos plu uzebla.”

La segiloj ŝmacis.

„Nun post kiam vi trasegis la kadron je kvar partoj, estos necesaj multaj ferstangoj.”

La segiloj ŝmacis, kaj post iom da tempo Bertold povis konfirmi.

„Nun la tegmento taŭgas nur por fajroligno.”

La laboro estis farita. La viroj ekstaris kaj forviŝis ŝviton. Ili ŝajniĝis, ke malsaĝa Bicer tute ne ekzistas. Sed li ne povis sin regi: „Sed Gotlib mi tamen ne povas kompreni, kial vi trasegis la tegmenton.”

„Por ke ni povu ĝin porti en la aŭtomobilejon, vi de Dio forpelita malsaĝulo.”

„Sed kial vi volas ĝin porti en la aŭtomobilejon?”

„Sed kien ĝin meti?”

„Mi opinias — remeti ĝin sur vian kokinstalon, Gotlib?”

Longan tempon Gotlib Gonser staris kliniĝanta super la lignostaplo, ĝis la nova konkludo atingis la cerbon. Tiam li fulmrapide turnsaltis. — Jes, malantaŭ lia aŭtomobilejo, kaŝita malantaŭ juniperarbo, kontraŭ la malhela ĉielo vidiĝis la kokinstalo — sen tegmento.

En tiu ĉi momento de la turo de Pfiferlingena preĝejo, la kristana blovmuzikistaro komencis bravan Kristnaskmarŝon.

La segileto gliĉiĝis el la mano de Gotlib Gonser kaj profunda malĝojo pleniĝis lian animon.

BELARTA KONKURSO 1957

Ni invitas la okan fojon niajn verkistojn kaj artistojn konkuri en la Belarta Konkursito. Internacia komisiono prijuĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj kaj la prezento de la gajnintaj verkoj okazos dum la 42a Universala Kongreso. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion. La 5 branĉoj:

Literatura Sekcio

1. *Originala poezio* (maksimume 108 versoj per 1–3 poemoj).
2. *Tradukita poezio* (maksimume 108 versoj per 1–3 poemoj).
3. *Originala prozo* (ĉiu prozaĵo maksimume po proks. 12000 literoj).
4. *Originala drameto* (ludodaŭro maksimume 25 minutoj).
Oni rajtas partopreni per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj laŭeble aperos en la organo „Esperanto” kaj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto. Skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj sur aparta slipo la pseŭdonimon kun via vera nomo kaj adreso, eventuale kun via kongresnumero aŭ kun membromarko de UEA. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo.
5. *Kongreslanda branĉo*. La tasko por 1957 estas anoncota.

Ĝeneralaj reguloj por partopreno

1. Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 42a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA (ĉu rekte, ĉu per „adopto”).
2. Sendu ĉion al la peranto, s-ro K. Lawrence, 244 Quinton Road, Birmingham 17, Anglujo. La peranto havas la devon konservi la anonimecon de la partoprenanto.
3. La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31a de marto 1957 por la Literatura Sekcio.
4. Konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj en unu sekcio): por britoj, 1 ŝilingo 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn: 3 respondkuponoj (maldekstre stampitaj) aŭ malpli laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesita, la partopreno estas senpaga.

Dank’ al la fondo de „Literatura kaso” ni havas esperon altiĝi la premiajn sumojn. Pri tio „Esperanto” donos detalajn informojn.

F. Szilagyi, Sekretario

el „ESEJO PRI LA KRITIKADO”

de

ALEXANDER POPE (1688-1744)

Dubinde, ĉu aspektas pli malsprita
Fuŝverko aŭ kritiko fuŝfarita;
Sed estas el la du malpli atence
Nin enuigi ol nin trompi sence.
Kelkaj l'unuan, multaj duan faras:
Riproĉas dek se unu verk' eraras;
Iam stultul' nur fuŝis sineksproze —
Pro fuŝpoet' nun dek stultulas proze.

Neniam niaj juĝoj koincidas,
Kiel horloĝoj — ni la propran fidas.
Tre rara estas la geni' poeta,
Kaj raras en kritiko gust' kompleta:
Same al kritikisto kaj aŭtoro
Venas denaske la ĉiel-favoro.
Instruu tiuj, kiuj mem plej kleras,
Kaj tiuj vipu, kies verk' superas.
Aŭtoro taksas sian arton ame,
Sed sian juĝon kritikisto same.

Kiu renomon doni kaj ricevi
Volas, kaj kiel kritikist' sin levi,
Sciĝu tre precize pri la limo
De siaj kler', talento kaj animo;
Ne iru preter sia pov'; diskretu,
Kaj sencon disde stulto interpretu.

Ĝi ĉiuj kaŭzoj, kiuj emas rompi
La homan juĝon kaj la menson trompi,
Plej firme regas en la kap' malplena
Fiero, ĉiam vigla voĉ' kretena.
Kien Natur' valoron ne deponas,
Kompense multon da fier' ĝi donas,
Ĉar kiam mankas, mense kiel korpe,
Viglec' kaj sango, ĝas' ŝveligas morbe:
Kiam ne servas sprito, nin subtene
Fier' la sencvakuon ŝtopas plene.
Se tiun nubon pelas for racio,
Aŭroras vero kvazaŭ taĝradio.
Ne fidu vin; por havi mank-indikojn
Uzu l'amikojn — kaj la malamikojn.
Iome kleri estas tre danĝere;
Eltrinku aŭ ne trinku, Muz-rivere:
La carbon ebrigas trinko eta,
Sed ree nin sobrigas sorb' kompleta.

Artverkon legas kritikist-modelo
Laŭ la spirito de l'aŭtoro celo,
La tuton juĝas, ne pedante kribras
Kie Naturo rava varme vibras:
Rezignas li pri l' ĝu' malica por ĉi
Plezuro: lasi sin de l'arto sorĉi.
Nin tuŝas en Naturo kaj en arto
Ne perfektec' de unuopa parto;
Belo ne estas lipo aŭ okulo,
Sed kunfandiĝ' de plena akumulo.
Se ni kupolon vidas proporcian
(Mirajon de la mond', kaj, Rom',
eĉ vian!)

Neniuĵ disaj partoj nin mirigas,
Sed la rigardon unuec' instigas;
Nek alto, larĝo, longo estas plia,
La tuto staras firme simetria.

Vane perfektion oni priinsistas —
Perfekto nek ekzistas nek ekzistas;
Laŭ cel' aŭtoro ĉiam serĉu sencon,
Neniu preterpovas la intencon,

Kaj se la stilo taŭgas laŭ la celoj,
Aplaŭdoj nepras, malgraŭ bagateloj.
Artistoj, kiel mostoj, devas preti,
Evite eraregojn, erareti:
Ignoru leĝojn de l' kritiko buŝa,
Indas nescii pri malgravo fuŝa.
Plimultaj kritikantoj triviale
La tuton dependigas surdetale,
Nomas principojn juĝojn en dorloto,
Kaj oferadas ĉion al maroto.

Kelkaj nur Fantazion altestimas,
Ke brilajn pensojn ĉiu vers' esprimas,
Tre ŝatas verkon se abundas straso,
Ĥaoso pompa kaj spritaj-amaso.
Poetoj ne havantaj la nivelon
Pentri naturon nudan, vivan belon,
Aldonas oran kaj juvelan kovron,

Kaj per ornamoj kaŝas artan povron.
Art' estas la natur' en vest' konforma,
Pensita ofte, sed ĝis nun senforma,
Io, kies vereco nin stimulas,
Kiu al ni la menson respegulas.
Kiel pro ombro lum' pli evidentas,
Tiel simpleco spriton kompletas.

Aliaj donas al Lingvaj' aprobon,
Kaj ŝatas librojn kiel ino robon;
Tia persono laŭdas: Tre bonstila; —
Kaj pri l'enhavo restas senkonsila.
Vortoj similas al folioj — kie
Abundas ili, mankas fruktoj tie.

Sed la plimulto laŭ la Ritmo ŝatas,
Esploras nur: ĉu ĝlata aŭ malĝlata;
Ĉe Muzo, kiu mil logaĵojn havas,
Ĉi malspritulojn nur la voĉo ravas;
Ili parnasas nur por sonaj vantoj,
Ne por edifo, kiel kirk-irantoj
Kiujn instigas ne doktrin', sed kantoj.

Dum ripetiga skando monotona,
Eterne reaperas rim' sablona;
Se oni versas pri „amanta koro”,
Tre certe tuj „turmentas ĝin doloro”;
Se temas pri „la kara bela formo”,
Minacas la leganton (fakte) „dormo”.

Fluigas arto, ne hazard', la stancon:
Sin movas flue, kiu lernis dancon.

el la angla: William Auld

Belarta Konkurso 1956.

Originala Poezio. Dua premio

Claude Piron

LA SUFERO DE L'ALIAJ

*Sufero de amiko ol propra pli turmentas.
La sian oni portas, kaj oni konas ĝin,
kaj ŝajnas laŭnature, se lacon oni sentas,
ke oni ĝin elportu, ĉar estas laŭ destin'.*

*Ĝi estas posedaĵo, kaj oni je ĝi riĉas,
sed kiam proksimumon bruligas la dolor'
ne eblas komuniko, kaj oni malfeliĉas,
ke oni staras stulte kun senefika plor'.*

*Kaj ĉia simpatio aŭ pruvo de kunsento
ne povas liberigi de suferula sol',
ne povas agi brakoj, man' plenas nur per vento,
dum vortoj ne dolĉigas, kaj senutilas vol'.*

*Hol! Tiel vidi fratron kun vundo tro intensa,
kaj scii ke nenio lin gvidos el ĉagren',
ne povi porti pecon de lia peno densa
kaj resti sen rimedo rolante en malplen'!*

*Ekvidi en okuloj alvokon de alarmo,
kaj aŭdi la doloron tremanta en parol',
proksimi, sed ne povi, el amikeca varmo,
pli doni ol kompaton, kun vano de konsol'!*

*Preferas mi suferi inferon da sufero
ol senti ĝin en frato kaj stari antaŭ mur',
tra kiu varma lumo de mia am-ofero
ne povas elradii ĝis lia malsekur'.*

Antikva Marseille

Dum la pratempoj, kiam la brua ondegdo de la arbaroj plaŭdrompiĝis de la Alpoj flankoj ĝis la dentaj randoj de la fjordetoj de Marseille, liguraj triboj, kies nomon oni apenaŭ scias, okupis la marbordon de Rodano ĝis Apeninoj. Probable, ke jam de la historikomenco Fenicianoj, unuaj markomercistoj, vizitis ĉi tiun marbordon kaj alteriĝis en ĉi tiun rodeton, tiel bone ŝirmitan kontraŭ la tempestoj. Siavice, grekoj venis, proksimume 600 jarojn antaŭ nia erao: ili estis foceanoj. Ili nomis ĝin „Lacidono“ eble aludante la lagunojn, kiuj plilongigis la akvebenon ĝis la proksimaj montetoj.

Ĉu tiu ĉi sekura ankraĵo, kiu ricevis rivereton inter du termamoj kapablaj subteni akropolon kaj starigi lumturon antaŭ rodo semita per insuletoj, ne markis la lokon, kie mara kaj komerca urbo povos naskiĝi kaj pligrandiĝi? Tion ili kredis. Oni scias kiel, post ol esti alteriĝinta funde de antaŭdestinita fjordeto, Protis inspirita de la dioj portis donacon al la reĝo de la „Segobriĝoj“. Nu, estis la tago, kiam post bankedo Gyptis, reĝofilino, devis elekti sian edzon. La feliĉa greko, salutita per la nomo Euxénos, vidis la fianĉpokalon. Tiel, la plej ĉarma el la legendoj poeziigas la originon de la greka kolonio. Tiel, tra la vivanta portiko de du virinbrakoj kronitaj de la ambona simbolo de la kaliko la tuta historio de „Massalia“ (unua nomo de Marseille) estis pasonta.

Komence, tre modesta haveno! Ĉirkaŭ kabanoj el tero kaj kabanoj el tero kaj kanoj, magazenoj el tabuloj prenitaj el

kverk- kaj pinarboj, kiuj en la tempo de Luciano (unua jarcento) kovris la proksimajn altaĵojn. Tiel estis la humila deveno de ĉi tiu „Canebière“, de ĉi tiu kvartalo de deponejoj, kiujn oni same retrovas en la primitiva Romo kaj en ĝia kolonio Lugdunum (Lyon). Tre frue oni establis en Massalia administrantojn, kies saĝeco pli malfrue estis laŭdita de Aristotelo kaj Cicerono; oni ekpisis ŝipojn, oni fondis kontorojn kiaj „Agatha“ (Agde), Niké (Nice) kaj Antipolis (Antibes), „Citharista“ kaj „Tauroentum“ subterigita per maraj sabloj. De ĉi tiu marbordo, florigita per greka mildeco, multmemaj maristoj foriris al la ardaĵbordoj de Okcidenta Afriko kaj al glaĉiigita kaj mistera Thulé (Islando).

Subtilaj, kiel ĉiuj grekoj, tiuj Massalia-anoj tuj komprenis ke, por rezisti al la premo aplikita sur siaj marbordaj kolonioj kaj kontoroj de la liguraj kaj keltaj najbaroj, la romia amikeco necesis. Ili klopodis akiri ĝin, sukcesis kaj longatempe restis fidelaj. Sed komence de j. 134 antaŭ Kristo, kiam la legioj ekaperis sur la valo de Rodano por helpi siajn liganojn kaj post malmulte da tempo fondi tie la kolonion „Aquae Sextiae“ (Aix), Marseille antaŭsentis la danĝeron de la profitema protekto. La dioj volis tiel, ke la urbo eraris dum la rivaleco inter Cezaro kaj Pompeo kaj partianiĝis por la dua. Por puni ĝin, la konkeranto de Gallujo sieĝis kaj detruis ĝin, kreinte duoblan konkurencon: „Arles“ kaj „Frejus“.

Se oni kredas la lokajn tradiciojn, la radioj de la Evangelio tuŝis la proven-

cajn marbordojn preskaŭ tuj post la ĉieleniro de Kristo. Tra la havenoj de Marseille kaj Arles (la fakto estas certa), sekvante la malnovajn sulkojn fositaj de post jarcentoj en Rodano de la foceaj kaj smirnaj barkoj, la „bona novaĵo“ atingis Lyon. Tuj post j. 177 de nia erao, kristanoj el Vienne kaj Lyon konfesis ĝin ĝis turmento kaj monto. La unua konita episkopo de Marseille vivis komence de la IVa jarcento. Cent jarojn poste, fama monaĥo, Sankta Kasio, konstruis malgrandan bazilikon ĉe la suda flanko de la haveno, supre de groto.

Estus interese, sed tro longe, skizi la historion de Marseille dum la mezepoko, en tempoj de barbaraj invadoj, feŭda kaoso, luktoj kontraŭ la araboj, poste dum la tumulta suvereneco de la grafoj de Barcelono, Provenco kaj d'Anjou, fine dum la epoko de Reĝino Johano kaj de la bona reĝo Renato, resume ĝis la jaro 1486, kiam la provinca delegitaro balotis la kunigon de Provenco al la franca reĝlando. Francigita, Marseille baldaŭ pruvis, ke spite de sia sendependeca deziro ĝi havis profundan senton de nacia solidareco. Ĝi kontraŭstaris Karlon la V-an, en 1536. Jam en 1524 la sieĝo, dum kiu eĉ la virinoj supreniris la remparojn por forpeli la atakojn de la trupoj de la imperiestro honorigis la kuraĝan civiton. Dum la terura pesto en 1790, kiu nur en la urbo mortigis kvardek mil homojn, la sindonemo de Kavaliro Roze, de la ŝiparestro Langeren, de la skabenoj Estelle kaj Moustier, de la Episkopo Belzunce kaj de multaj nekonataj civitanoj atingis heroan gradon.

Je la radia komenco de la Revolucio, kiam eksplodis la Marseilla patriotismo, tiu estis en la arda amo al la libereco kaj al pura spirito de frateco, dank' al kiu la „Militkanto de la Rejnarmeo“ fariĝis la senmorta „Marsejlezo“. Tamen, Marseille, kiu iam ribeliĝis kontraŭ la Ministro Kardinalo Mazarin (1685), kiu provis redukti ĝiajn tradiciajn privilegiojn, Marseille ribeliĝis kontraŭ la tironeco de la Konvencio (1795). Jam la granda mediteranea haveno komencis bedaŭri la tempon, kiam la granda Ministro Colbert donis al ĝi veran monopolon de la trafiko kun la havenoj de Malgrand-Azio. Sub la Unua Imperio la kontinenta blokado preskaŭ bankrotigis ĝin.

Sed persisto estas Marseill-a virto. Hodiaŭ, la homoj sur la stratoj Canebière formas apartan universon. Viglaj, gajaj, rapidaj en entuziasmo kaj en ĉagreno, mokemaj kaj ŝercemaj, eble fanfaronaj sed esence seriozaj kaj pozitivaj, gajigitaj de la vivspektaklo, tre spertaj por trovi la kvintesencon! Aŭdacaj maristoj, delikate lertaj komercistoj, agemaj ŝipekipistoj, industriistoj, imagemaj negocistoj planantaj kaj vidantaj malproksimen, tiaj estas la Marseill-anoj. Oni ne devas konfuzi ilin kun la kosmopolita popolo, kiu svarmas en ĉiuj grandaj mediteraneaj havenoj, en Barcelona kiel en Napoli, en Alger kiel en Bastia.

André Chagny

(el la verko „Marseille“ eld. Arland)



Idilia strando en Bandol, ĉe Marseille



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:
Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

Junularo Esperantista de Svislando

Atentu! Bone aŭskultu!

Svislando vokas vin al siaj du ESPE-
RANTO-JUNULARAJ SKISEMAJNOJ
en ADELBODEN.

Unua semajno: de la 23-a de decem-
bro ĝis la 30-a de decembro 1956-a.

Dua semajno: de la 30-a de decembro
1956-a ĝis la 5-a de januaro 1957-a.

Junuloj, ne hezitu! Adelboden estas
fama skistacio ĉe la Bernaj Alpoj (1350
m. super la marnivelo).

Ni luprenis alpan lignodomon, kie ni
povos vivi belajn feriojn en samideana
atmosfero. Jen granda ĝojo por la skiis-
toj kaj por la skilerntoj.

Profitu de tiu manifestacio, subtenu la
organizantojn per via partopreno kaj via
propagando ĉe via amikaro.

Prezo: Unu skisemajno kostas 85.—
svisajn frankojn aŭ 285.— stelojn, ĉio
enkalkulita: loĝado, manĝaĵo, asekuro
kontraŭ akcidentoj, 2 ekskursoj per ski-
veturiloj, skikurso por la komencantoj...

Pagmaniero: Partoprenontoj, bonvolu
nepre anonci poŝtkarte vian partoprenon
al la unua (23—30 XII) aŭ al la dua (30
XII—5 I 57) skisemajno, kun viaj nomo,
antaŭnomo, naskiĝjaro, adreso. Bonvolu
samtempe antaŭpagi 15.— svisajn fran-
kojn per internacia mandato al la ĉek-
konto IV 6151, Claude Gacond, Espe-
ranto, Crêt 78, La Sagne, Neuchâtel,
Svislando, aŭ sendi perletere 50.— ste-
lojn al la sama adreso. Bonvolu menci-
i: por la unua aŭ dua skisemajno.

Atentu! Estas eblecoj lupreni skiojn,
sed bonvolu tuj averti nin pri tiu deziro,
kun via alto en centimetroj, por ke ni
povu elekti konvenajn skiojn.

Ne hezitu ĝis kiam ĉiuj litoj estos oku-

MALBONA KONDUITO KAJ MAL- BONA PROPAGANDO

Terura estas la fakto pri neĝentileco
de kelkaj esperantistoj vojaĝantaj ekster-
lande. Jen la afero: La Delegito de UEA
en Perpignan ricevis la informon ke Es-
perantisto vojaĝante al Suda-Afriko tra-
pasos Perpignan merkredon la 19-an de
septembro, je la dek-oka alvenonte an-
taŭ la ĉefa Poŝtoŝtacio. La Delegito tion
anoncis en la gazetaro, kunvokis la ge-
samideanojn, sed la koncerna Esperant-
isto ne venis kaj ĉiuj atendis vane dum du
horoj!... Notinda fakto: Tiu samideano
ne skribis aŭ telefonis por doni kontenti-
gajn klarigojn.

Sed, jen alia afero. Ni ricevis el Bada-
lona (Hispanujo) leteron anoncanta al ni
ke dek Samideanoj de Esperantista Grupo
en Barcelona alvenos per buso en

Perpignan, la domo ne estas elasta; do tuj
aligu!

*Junulara Sekcio de Svisa
Esperanto-Societo*

MALLONGAJ INFORMOJ

* Ĝis la 25-a de oktobro 4 Esperan-
tistaj Landaj Asocioj aliĝintaj al U.E.A.
sciigis pri ekzisto de propra junulara
sekcio: Bulgara Esperantista Asocio,
Germana Esperanto-Asocio, Itala Espe-
ranto-Federacio, Svisa Esperanto-So-
cieto.

* Junuloj sub la aĝo de 21 jaroj in-
formu la personon, al kiu ili pagas la
kotizon, pri sia naskiĝjaro; por ili la
kotizoj estas: 2.50 ned. gld. kiel MJ,
5.— ned. gld. kiel MA. Studentoj sub
la aĝo de 25 jaroj, kiuj ne povas pagi la
ordinaran kotizon, povas ĝui la saman
rabaton kiel la junuloj sub 21 jaroj, in-
formante la personon, al kiu ili pagas
la kotizon, pri sia naskiĝjaro kaj studen-
ta kondiĉo, kaj samtempe deklarante,
ke ili ne povas pagi la tutan kotizon.

* Esperantistaj skoltaj partoprenontoj
la jamboreon de Sutton Coldfield (An-
glujo) informu pri tio la sekretarion de
Skolta Esperantista Ligo, Charles Bards-
ley, 42 Westbourne St. Oldham, Lancs.
Anglujo, por eventuala aranĝo de Espe-
ranto-kunveno.

* Partoprenontoj en la 6-a Tutmonda
Junulara Festivalo povas peti informojn
ĉe Prepara Komitato de la 6-a Tutmonda
Junulara Festivalo, Moskvo, Sovetio.

* Freŝajn informojn pri la junulara
movado vi povas aŭdi ĉiumerkrede de
Radio Roma (vidu la tabelon de la Es-
perantaj dissendoj).

Nicola Minnaja, sekretario

Perpignan, dimanĉon la 23-an de sep-
tembro, je la deka. Ni respondis tuj,
aldonante multajn klarigajn informojn,
(al kaj el Marseille) kaj planon de nia
urbo. Ni aperigis artikolojn en la gaze-
taro, ni kunvokis la grupanojn kiuj venis
akurate al la sidejo je la fiksita horo.
Eĉ venis Delegito de alia urbo. Ĉiuj
atendis pacience dum tri horoj (ĝis la
ŝektria), sed, neniŭ el la anoncintaj vizi-
tontoj montris eĉ la „nazon”. Membro
de la Grupo spontane restadis en la si-
dejo dum la tuta tago (8 horojn) aten-
dante, sed vane, la alvenon de la „fan-
tomaj” vizitontoj. Tiuj du tre bedaŭrindaj
okazintaĵoj dum la sama semajno sufiĉe
elokvente elmontras, ke eĉ en la esperan-
taro estas personoj kiuj ne hezitas „moki
la najbaron” kaj ĝeni ĉiujn. Tio nepre
devas ne ekzisti. Estus tamen facile tele-

INTERNACIAJ TEJO-SKISEMAJNOJ 1956/57

Junulara vintrosporto en la
Belega Montaro de Salzburg

La ĉi-jaraj skisemajnoj de TEJO oka-
zas de la 26-a de decembro 1956-a ĝis
la 6-a de januaro 1957-a en la montara
vilaĝeto Dienten ĉe „Hochkönig” en la
aŭstra liglando Salzburg.

Dienten situas piede de la glacimonto
„Alta Reĝo” kaj ofertas bonegan skite-
renon kaj por komencantoj kaj por sper-
tuloj. Ni povas laŭplaĉe elekti inter ĉe-
domaj skikampoj kaj duon- aŭ tut-tagaj
ekskursoj. Komprenoble ni skios en plu-
raj grupoj starigitaj laŭ la grado de la
sperto.

Ni loĝos en la gastejo „Hochkönig”,
kiu estos ekskluzive je nia servo. La litoj
estas agrablaj kaj la manĝo (laŭ certigoj
de la mastrino) estos abunda eĉ por
grandapetituloj.

Ceestos ankaŭ la fama skiisto Toni
Sailer, gajninto de la Olimpiaj ludoj en
Cortina d'Ampezzo, aŭ lia ne malpli
fama konkuranto Anderl Molterer.

La prezo por la tuta tempo estas 400
aŭstr. ŝil.; por ĉiu tago malpli vi pagos
35.— aŭstr. ŝil. malpli.

Vian aliĝon sendu plejeble baldaŭ al
la gvidanto de la skisemajnoj: samideano
Heinrich Reiter, Salzburg I, 557.

La limnombro por aliĝoj estas 55; tuja
aliĝo do estas en via propra intereso!
Ĉiu aliĝinto ricevos detalan cirkuleron.
(Se tamen vi petas specialajn informojn
nepre aldonu int. respondkuponon). Por
aliĝo sufiĉas simpla poŝtkarto aŭ letero
kun: nomo kaj adreso, aĝo, sekso, metio.

Oni havas la eblecon antaŭpagi la
koston al la ĝirokonto 12-201 ĉe „Salz-
burger Sparkasse”, Salzburg, Aŭstrujo;
tamen antaŭpago ne estas postulata.

Gejunuloj, liberigu vin por pasigi uni-
kajn tagojn en agrabla internacia ron-
deto junulara. Venu, ni atendas vin!

Heinrich Reiter

foni aŭ sendi telegramon, leteron aŭ poŝt-
karton, por senkulpiĝi sin pri la neakura-
teco aŭ la neantaŭviditaj kontraŭaĵoj.

R. LLECH-WALTER,
Estrarano de U.E.A.

Noto de la A.O.: atingis nin ankaŭ plu-
raj aliaj plendoj, ekz. pri neesperantistaj
karavanoj, gvidataj de profitemaj esper-
antistoj kiuj plej malmodeste ekspluatas
la delegitan reton, malĝentile kaj postu-
leme konduktantaj al helpemaj, sinoferaj
delegitoj.

Ni plej serioze avertas ĉiujn personojn
al kiuj povos koncerni la supraj linioj,
ke U.E.A. ne permesos ke iuj esperant-
istoj senkreditigos la reputacion de Es-
peranto kaj ĝia movado kaj forpelos el
niaj vicaj niajn plej bonajn delegitojn.
Se novaj kazoj atingos nin, ni ne hezitos
publikigi la nomojn de la kulpuloj.

Tra la Mondo

• La centro pri la infanaj desegnaĵoj ĉe la Ligo de la societoj „Niaj infanoj” en Zagreb, Jugoslavio, invitas al internacia konkurso pri infanaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj sub la titolo „Mia Hejmo”. La konkurson povas partopreni la infanoj inter 5—16 jaroj (naskitaj ek de la jaro 1941 plue). Oni aljuĝos 3 orajn medalojn, 6 arĝentajn medalojn, k.t.p. Limdato por akcepto de la eksponaĵoj estas la 1-a de marto 1957. Oni petu esperantan prospekton pri la kondiĉoj ĉe: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, Zagreb I., Poŝtfako 213, Jugoslavio.

• La 4a Internacia Esperanto Ferio-Semajno okazis de la 12a ĝis la 20a de aŭgusto en vilaĝo Krommenie, Nederlando. Partoprenis personoj el Francujo, Anglujo, Germanujo, Finnlando kaj Svedujo, sume 60.

• Pro la laboro de f-ino C. M. Burger, Utrecht, la urbestaro de tiu urbo decidis financi du esperanto-kursojn inter la ĝeinstruistoj lernejoj. La kursojn gvidas s-ro J. Vanecek.

• La 21an de septembro, dum la Fervojist-Esperantista Ferio-Semajno en Vieno, Aŭstrujo, vicurbestro Karl Honay diris, ke la urbo nomos novan straton laŭ D-ro Zamenhof, kaj ankaŭ restarigos la siatempe detruitajn Zamenhof-Tabulon sur la iama Hotelo Hammerand, kie Zamenhof vivis dum sia unujara studado en Vieno.

• La litova gazeto Komjaunimo Tiesa aperigis en sia numero 196 (2819) bonegan artikolon pri Esperanto, subskribitan de St. Sabalis.

• En urbo Kolarovgrad, Bulgarujo, okazas nuntempe 7 diversaj Esperanto-kursoj.

• Niaj brazilaj samideanoj preparas sian XVan tutlandan kongreson de Esperanto por memori la oran jubileon de Brazila Esperanto-Ligo, unu el la plej viglaj membroj de UEA kaj la plej granda Esperanto-Organizaĵo en la Nova Mondo, kiu jam de jardekoj funkcias senpage en ĉambroj de konstruaĵo apartenanta al la landa registaro, kvazaŭ ministeria departemento. La memoriga kongreso okazos en Niteroi, ĉefurbo de ŝtato Rio de Janeiro, en julio 1957.

• En leningrada ĉiutaga ĝejnulara gazeto „Smena”, n-ro de 19.9.1956, aperis unuaranga artikolo „Esperanto — internacia lingvo de la paco kaj amikeco”, verkita de S. Poltavskij.

• La 19an de julio 1956, s-ro Ota Ginz el Praha, nun loĝanta en Israellando, festis sian 60an naskiĝtagon. Li lernis Esperanton en 1908 kaj dediĉis plejparton el sia vivo al nia afero. Li atingis grandajn sukcesojn en organizo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, kaj rimarkinde aktivis ankaŭ en nia literaturo. Lia edzino estas ankaŭ sperta esperantistino.



42-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957 — Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo. Telefonoj: Prado 55—46; Ferréol 98—18. Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa.

Girkonto: Groupe Esperantiste — Marseille n-ro 156-15.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2 Novembro 1956

Poŝtkartoj: La koloraj kongresaj poŝtkartoj estas riceveblaj pere de la Landaj Asocioj aŭ ĉe la Universala Kongreso. Prezo: 100 fr.fr. aŭ 4 respondkuponoj por 10 ekzempleroj.

Glumarkoj: La Landaj Asocioj aŭ la Universala Kongreso povas liveri la multkolorajn kongresajn glumarkojn. Prezo: 100 fr. fr. aŭ 4 respondkuponoj por 2 folioj de po 25 markoj.

Loterio: Kiel anoncote, estos lotumitaj 36 premioj inter la unuaj mil kotizintaj kongresanoj. La unuaj tri premioj konsistas el stipendioj, respektive: 15.000, 7.000 kaj 3.000 fr. fr.

Hoteloj: Provizoraj prezoj de hoteloj en Marseille: 1.a. Kat. = 1.000/3.500; 2.a. Kat. = 600/2.700; 3.a. Kat. = 500/1.970; 4.a. Kat. = 470/1000. Informoj pri komuna loĝejo kaj tendumego aperos en venonta komunikilo.

Vivkosto en Marseille: Aktualaj mezaj prezoj en Marseille: Vino: 50 fr. fr. por litro; viando: 500; fiŝoj: 300/500; karotoj: 30; tomatoj 50; verdaj salaĵoj: 80; florbrosiko: 50; kukumetoj: 100; pizoj, fazeoloj: 120; artiŝokoj: 150 por kg. Piroj, pomoj, vinberoj, kaŝtanoj: 100; bananoj: 200 por kg. Dumsomere multaj prezoj estas malplimultekostaj.

• Post la U.K. 1957 en Marseille, KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) okazigos sian kongreson, de la 10a ĝis la 17a de aŭgusto en la kastelo „Münchenwiler”, proksime al Murten, ĉe la lago Murten, Svislando.

• Aperis ĉinlingva traduko de la ĉeĥa novelaro „Muta barikado” de Jan Drda. La tradukon faris samideanoj Hon-fan kaj Li-Laojon laŭ Esperantlingva manuskripto de Imrich Zalupsky kaj Miloš Lukas.

• En la jubilea jaro de la ĉeĥa poeto Karel Havlíček Borovský aperis nova eldono de liaj poemoj sub titolo „Basne”. Sur paĝo 148 skribas la redaktinto de la kolekto, Jaromir Belic, jenajn vortojn: „Nia eldono estas esence konforma kun la teksto de la poemoj, kiel ili estas represitaj en la eldono de 1951. Iom

Dua bulteno: Ĝi aperos komence de januaro. Por reklami en ĝi aŭ por kunsendi turismajn broŝurojn aŭ propagandilojn en Esperanto vin turnu ĉe la Universala Kongreso.

Vizito: La Komerca Ĉambro de Marseille donacas al 800 kongresanoj senpagan perŝipan viziton duhoran en la haveno de Marseille, la plej granda en la Mediteraneo.

Antaŭkongreso: La Universala Kongreso kunlabore kun la Esperantista Federacio de Parizo organizas Oficialan Antaŭkongreson en Parizo de la 31-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1957. La programo antaŭvidas altnivelajn prelegojn, vizitojn en la mondfama urbeĝo kaj ekskursojn al ravaj vidindaĵoj. La Antaŭkongreso estas rezervita por aliĝintoj en la Universala Kongreso.

Statistiko: (ĝis fino de oktobro) Aŭstrujo 3, Belgujo 4, Brazilo 3, Britujo 13, Bulgarujo 2, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 58, Germanujo 13, Hispanujo 3, Italujo 20, Jugoslavio 9, Japanujo 1, Maroko 2, Nederlando 10, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 2, Svedujo 16, Svisujo 10, Usono 1. Entute 186 el 21 landoj. (Pasintjare 232 el 17 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

grava ortografia ŝanĝo estas farita sole en la „Bapto de Sankta Vladimir”, kie nun staras „kacik” anstataŭ la ĝisnuna „Kacik”, ĉar montriĝis (merite de Dr. Tomas Pumpr, tradukinto de la Bapto en Esperanton), ke tiu ĉi vorto ne estas propra nomo, kiel oni ĝis nun opiniis, kaj oni sukcesis klarigi ĝian signifon”.

• En la Universitato de Barcelono, dum la 17a Hispana Kongreso de Esperanto, D-ro Petro Font Puig, universitata profesoro pri psikologio, prelegis pri „Esperanto, efekte kaj kaŭzo de rezonado kaj amo”.

• La hispana Nacia Edukado-Ministerio, pere de sia Kultura Disvastigo-Komisariejo, aprobis la oficialigon de la kursoj de Esperanto per Korespondado de la Hispana Esperanto-Federacio, kiujn gvidas s-ro Ramón Molera el Moya (Barcelono).

ESPERANTISTA VIVO

Naskigo

Bernard. Francis, filo de ges-roj **Bernard**, 26 rue Pierre-Joigneaux, Bois-Colombes (Seine), Francujo, ricevis je la 20a de septembro 1956 fratineton, kiu nomiĝas Sylvie.

Fianĉigo

F-ino Edeldgard Korthals el Gevelsberg /Vestfalia, kaj s-ro Horst Fischer, Saarbrücken, fianĉiĝis la 29an de septembro.

NEKROLOGO

Aydinoglu. Forpasis dum marto en aĝo de 72 jaroj s-ro Hulüsi **Aydinoglu**, longjara Delegito de UEA en Aydin, Turkujo, unu el la pioniroj en tiu lando.

Cakmak el Bursa. En la maja n-ro de „Esperanto” aperis anonceto de s-ro Faik **Cakmak el Bursa.** En la sama monato tiu pioniro kaj iama Delegito de UEA en Söke, Turkujo, mortis pro kora apopleksio.

D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondajo Neydharting

Por 4. — 17. marto 1957 denove tri helpbezonaj eksterlandaj organizitaj kaj de sia E-organizo rekomenditaj esperantist(in)oj, vere malsanaj je reŭmatismo, koksoloroj, artrito aŭ virinaj suferoj, al kiuj ilia kuracisto rekomendis marĉajn banojn, povas ĝis maksimume 31.12.1956 aspiri stipendion por ricevi 14-tagajn senkoston loĝadon, manĝojn, kaj ĉiutagan marĉan banon sub kuracista kontrolo en la konata marĉa kuracbanejo Neydharting en Supra-Aŭstrio. Ankaŭ la fervojveturaj kostoj 3. kl. de la aŭstria limo al la banejo kaj returne estos pagataj al la stipendiuloj. Krome ili ricevos unufojan poŝmonon de 50 aŭstr. ŝilingoj. Aspirantoj petu pli detalajn informojn nur kontraŭ respondefranko de la **D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondajo, Geistinger-gasse 1/6/16, Wien 19, Aŭstrio.**

Redakcia noto

Hodiaŭ vi tenas en la manoj la lastan kajeron de nia jarkolekto 1956. Ni invitas niajn legantojn skribi sur poŝtkarton kaj sendi al nia redakcia adreso ilian respondon al jenaj du demandoj: (i) Kio aparte plaĉis al vi en la revuo dum 1956? (ii) Kio ne plaĉis al vi en la revuo dum 1956?

Ni kore dankas al la aŭfablaj informontoj.

Esperanta loterio - granda evento en la historio de Jugoslavia Esperanto-movado

Por akiri la financajn rimedojn, kiujn la Jugoslavia Esperanto-movado nun malhavas kaj bezonas por plenumi siajn transprenitajn taskojn, — Jugoslavia Esperanto-Federacio aranĝis Esperantan loterion kun permeso de la Ŝtata konsilantaro por financoj kaj kun subteno de la Jugoslavia Loterio.

La lotumado de la unua Esperanta loterio en Jugoslavio — kiun dum unu plena monato vigle propagandis en la tuta lando reklamanoj en gazetoj, radio-stacioj, diapozitivaj en kinejoj, afiŝoj en la urboj kaj la vilaĝoj kaj esperantistoj kaj disvendantoj en la tuta lando — okazis la 13-an de oktobro en

Ljubljana. La belega suna vetero altiris al la vasta Placo de Revolucio amason da interesatoj, kaj ĉiujn allogis tien la sama deziro kaj espero: gajni se ne la ĉefan tiam almenaŭ la kroman premion aŭ gajnaron.

Sur aparta podio, ornamita per naciaj, ŝtataj kaj E-flagoj, estis starigitaj lotumiloj de Ŝtata loterio kaj antaŭ ili ses virinoj en pitoreskaj popolaj kostumoj kaj la estrado por diversaj komisionoj (loteria, urba kaj financa) kiuj ĉestis la lotumadon.

La lotumadon malfermis la prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio Peter Zlatnar, kiu en sia parolado salutis la ĉestantojn kun danko por ĝisnuna morala helpo al nia movado kaj bonŝanco. Post necesaj formalaj oni transiris al la lotumado. La aranĝo estis fotita kaj filmita. La plej streĉaj estis tiuj momentoj kiam oni transiris al lotado de la plej grandaj premioj, ĉe kiuj unu el la rigardantoj movigis la lotumilradojn.

Oni povas diri ke dank' al aranĝo de la loterio ne ekzistas plu homo en Jugoslavio, kiu ne aŭdis ion pri Esperanto, kaj ĉar dorse de 500.000 loteribiletaj oni propagandis la korespondan kurson de Esperanto, multaj ekinteresiĝis por la koresponda kurso.

M. Ĝivoje

NOTO DE LA REDAKCIO: La kolektoj de Esperantaĵoj povas havigi ekzemplon de loteribileteto kontraŭ pago de poŝtelspezoj ĉe Jugoslavia Esperanto-Federacio, Ljubljana, Poŝtako 275. Jugoslavio.

Radio Roma - Decembro

Radio Roma. 4-XII, Monteverdi, kreinto de la muzika dramo; 5-XII, Mondo Esperantista; 7-XII, Itala komponisto Don Lorenzo Perosi; 11-XII, Itala sanktejo Loreto; 12-XII, Novajoj el Italujo; 14-XII, La 97-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof; 18-XII, Panoramo de Itala urbo Perugia; 19-XII, Nia gazeto; 21-XII, Vintro; 25-XII, Tri solenoj: Kristnasko, Novjaro, Epifanio; 26-XII, La Kristnaska bulko (rakonto); 28-XII, Leterkesto kaj bibliografio.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956				15.	Norvegujo	2318	1450	62,55	
Stato je la 31-a de oktobro									
Konkurso I				Konkurso II					
	Lando	Kvoto	Poentoj	%	Lando	Kvoto	Poentoj	%	
1.	Jugoslavujo	2629	3563	135,53	1.	Kanado	345	500	144,93
2.	Italujo	3025	3610	119,34	2.	Islando	330	405	122,72
3.	Francujo	5869	6460	110,07	3.	Portugalujo	495	580	117,17
4.	Svislando	1740	1890	108,62	4.	Maroko	937	1061	113,23
5.	Hispanujo	1825	1925	105,48	5.	Japanujo	1182	1210	102,37
6.	Svedujo	6893	6805	98,72	6.	Urugvajo	330	325	98,48
7.	Britujo	7608	7351	96,62	7.	Izraelo	300	290	96,66
8.	Nederlando	5074	4894	96,45	8.	Aŭstralio	1145	1025	89,52
9.	Finnlando	2872	2685	93,49	9.	Nov-Zelando	854	745	87,24
10.	Germanujo	6986	6505	93,11	10.	Sudafriko	305	230	75,41
11.	Belgujo	2135	1949	91,29	11.	Aŭstrujo	1485	1000	67,33
12.	Brazilo	6820	6205	90,98	12.	Meksiko	250	120	48,—
13.	Usono	3352	2428	72,43	13.	Irlando	250	55	22,—
14.	Danlando	2765	1885	68,53	N.B. Evidentiĝis juste ŝanĝi la kvoton de Izraelo al 300.				

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

ELEKTITAJ PRELEGOJ DE I.S.U.*
Dua serio. Eld. Muusses, Purmerend, '55.
104 p. 14.5 x 21. Prezo: 1.10 dolaroj.

Jen plaĉa volumo kun dekdu el la prelegoj elparolitaj okaze de la Internacia Somera Universitato de 1949 ĝis 1954. Kiel sciante, la I.S.U. estas kultura institucio de la Esperanto-Movado, kies „celo estas popularigi ĉiujn sciencojn kaj artajn branĉojn pere de la Internacia Lingvo kaj evoluigi la esperantan sciencon kaj priantan literaturon“.

La gravecon de tia institucio neniu devas preteratenti. Ne nur ĝia efiko estas kontribui al la ĝenerala levo de la kultur-nivelo de nia movado kaj al la firmigo de ties famo, sed ankaŭ montri kaj demonstri al la indiferenta mondo kaj ankaŭ al la skeptikaj lingvistoj kaj Blinkenbergoj, ke Esperanto estas perfekte taŭga por apliko en ĉiuj branĉoj de la homa kono kaj penso. Tion ni jam de longe scias mem. Sed tio ne sufiĉas. Necesas konstante demonstri kaj ripetiti.

Kaj ĝuste tial apero de ĉi-tiu libro estas grava, kiu ebligas al ni resonigi la instruojn de niaj prelegantoj kie ajn. Instruo en lingvo klara kaj tre komprenebla eĉ de nefakuloj. Verdire ĉiu el la prelegoj en sia fako konsistigas enkondukan lecionon pri la temo: plena ĉirkaŭbrako de la demando, sed lasanta la vere tro teknikajn klarigojn, kiuj igus la prelegon neinteresa, tro hermeta por laiko.

Kompreneble por prezenti al ni tian homogenecon de klara kaj intereso necesis elekti inter la 70 elparolitaj prelegoj de tiu periodo. Krome duono estis elektita inter „temoj rilatantaj al sociaj sciencoj“ kaj cetero inter tiuj koncernantaj la „naturajn sciencojn“: edukado, lingvistiko, juro, medicino, ekonomio, statistiko, fotografado, fiziko, fitologio kaj agronomio. La vario estas do granda. Kaj ĉiu esperantisto havos plezuron iom informiĝi per ekkono de streboj kaj ideoj de sciencoj fremdaj al lia propra fako aŭ metio: nur tiaj kontaktoj povas riĉigi la spiriton kaj malhelpi la sekecon kaj unutonecon de la penso.

Senutile diri ke la lingvaĵo de tiaj eminentuloj, kiaj Rektoro Söderberg, Prof. Collinson, Prof. Lapenna, Prof. Laurat, Prof. Sirk (mi devus ĉiujn citi) estas glata, senriproĉa. Tion krome garantias la duobla redaktado kaj de la redaktoroj de Scienca Revuo kaj de la Sekretario de I.S.U.: Prof. Lapenna.

Entute jen libro kiun mi povas sen-

rezerve rekomendi al ĉiuj: memorigo por la aŭdintoj de I.S.U.; konsolo por kiuj bedaŭras mal-ĉeeston, ĝi estos samtempe valora por la kleriĝo de ĉiuj kaj potenca ilo en la mano de ĉiu sperta propagandisto.

La supereco de Esperanto kiel Internacia Lingvo firme kaj alte establiĝis dank' al siaj beletraj ĉefverkoj: „Rajto de la ĉefverko“ ne estas vana parolo. Sed moderna kulturo entenas ankaŭ sciencajn verkojn. Ni ne forgesu tion, ĉar nur per la kulturo kiun ĝi kapablas disradii, lingvo vere kaj plene povas venki. Ni arde deziras ke nun plu kaj pli aperu sciencaj verkoj sub ĉiuj eblaj formoj. Tio estas neceso.

D-ro Andreo Albault

ĈIRKAŬ LA NASKIGO DE MIA MISIO* de Martinus. Kopenhago: La Spiritscienca Instituto de Martinus (Mariendalsvej 94, København F) 1956. 56 p., form. B 6. Dkr. 6.50.

La sama: **LA IDEALA NUTRAĴO. Samaj loko kaj tempo. 96 p., 1 tutp. bildo, form. B 6. Dkr. 6.50.**

Trian fojon okazis, ke malgranda religia kredantaro prenis Esperanton en sian servon por disvastigi sian idearon ankaŭ ekster la propra lando. Antaŭ la unua mondmilito tion faris la Bahaanoj, inter la du mondmilitoj Oomoto, fine post dua mondmilito la kredantaro de Martinus. Post kelkaj aliaj libretoj de Martinus nun aperas Esperantlingve tia pri „lia misio“ kaj tia pri „ĝusta nutraĵo“.

Laŭ ekstera aranĝo ambaŭ libroj meritas plenan laŭdon. Papero, presado, kaj bindo estas plaĉaj kaj bonstilaj, la lingvo estas perfekte bona kaj enmetitaj estas bonvenigaj paperoj el plumo de franca Martinus-adepto D-ro Albault, kiu samtempe havas nomon en la Esperantomovado kaj ĉi-tie tiras legantojn en agrablajn atmosferon. Koncerne la enhavon estas diferenco inter la du libroj.

La libron pri la misio de Martinus oni legas kun ŝato. Unu bazan ideon ĝi prezentas laŭ diversaj manieroj, sed ĉiam konvinke: se ni atribuas al antikvaj personoj kiel Budho, Jezuo, Mahometo la rajton manifesti dian revelacion, ni ne povas fornei tiun rajton de nuntempuloj, do ankaŭ ne de dana eksa kontoristo Martinus. La libro defendas la ekzistojrajton de la Martinus-doktrino sen elmontri ties enhavon.

La dua libro prezentas unu trajton de la doktrino, la kondamnon de vianda manĝaĵo. Certe Martinus trovas eĥon inter la legantoj, se li aŭ limigus sin al la motivo etika aŭ traktus la sanecan flankon laŭ maniero naturscienca-medicina. Sed li konsumas dekojn da paĝoj por elmontri la malbonfaradon de vianda manĝaĵo al homa saneco laŭ nur-filozofia vojo. Anstataŭ paroli pri mankantaj vitaminoj ktp. kaj pri la troestantaj steroj ktp. de vianda manĝaĵo Martinus nur parolas pri „la vibrado de viandaj viv-unuoj“ kaj similaj misteraĵoj.

Sendepende de nia opinio pri la doktrino de Martinus, ni ŝatas konstati, ke ankaŭ anaro rimarkis la utilon de Esperanto por la translevado de ideoj el nivelo unulanda en nivelon internacian. Laŭ tiu vidpunkto multaj Esperantistoj volonte pliriĉigos sian Esperanto-libraron per la montrinde-aspektaj libroj de Martinus.

Hemmo Tietti

LA REVOLUCIO DE ĈINIO* de Hanna Kobylinski. El la dana trad. C. Graversen. Eld. SAT, Parizo, 1956, 94 p. 14 x 19. Prezo: 250 fr. fr.

Kiam oni pripensas (kiel oni ne sufiĉe ofte pripensas), ke en sud-orienta Azio loĝas unu duono de la tuta homaro, kaj ke en Ĉinujo loĝas 500 milionoj da homoj, oni devas konstati, ke en la ne malproksima estonteco tiu mondparto ludos gravegan — eĉ eble suveren — rolon en la mondpolitiko. Eŭropanoj devas agnoski, ke la gravita centro de la mondo pendolas kun ĉiam kreskanta impeto orienten. Kaj tial ĉiu, kiu interesiĝas pri paca estonteco, devas kompreni la okazajojn, intajn kaj antajn, en malproksima oriento. Por tiu celo la libro de Hanna Kobylinski estas nepre tre utila.

Laŭ mi, la plej grava kaj atentinda fakto pri la nuna komunisma reĝimo en Ĉinujo estas tio, ke ĝi konsiderinde diferencas de la komunismo rusa-eŭropa: „La ideologio devenas de Marks-Lenin, sed per influo de „La Pensoj de Mao“ ĝi ekhavis specialan ĉinan karakteron, kiu evoluis ĝuste anstataŭ la punktoj, kiuj en la ortodoksa marksismo de Komintern montriĝis netaŭgaj por Ĉinio.“ Tiu diferenco devenis versaĵne de la fakto, ke 80% de la ĉinoj estas kamparanoj, dum „laŭ ortodoksa marksismo revolucio devas komenciĝi en urboj“; sed ĉiokaze ĝi donas iom da espero, ke la ĉina komunismo sukcesos eviti la erarojn, kiuj miskreditis por multaj homoj la eŭropan.

Se mi havas plendon pri tiu ĉi ĝenerale tre bona libreto, ĝi estas tio, ke la priskribado estas eble tro seka (seka ne necese = objektiva!), kaj pli ol unufoje iom tro konciza. Ekzemple (p. 23): „Sed unuecon en Ĉinio la japanoj timis pli ol alian, kaj nur duonjaron poste ili provokis militon, en julio 1937, per la evento ĉe la Marko-Polo-ponto sude de Peking“. Certe mi ne estas la sola, kiu malfeliĉe ne scias, pri kiu evento temas!

W. Auld

SABE LISTED ESPERANTO? * (Ĉu vi scias Esperanton?) de Jorge Hess, kun ilustraĵoj de Carlos Wappers. Nova lernolibro por hispanlingvanoj. Eldonita de la Liga Argentina de Esperanto, Castelli 265, Buenos Aires, Argentino. 160 paĝoj. Prezo: 25 Pesoj, plus 10% sendkostoj.

Dum la lastaj du jaroj montriĝis pli kaj pli grava la fakto, ke baldaŭ elterpiĝos la Esperantaj lernolibroj por hispanlingvanoj. Pro tio des pli bonvena estas la apero de ĉi tiu nova libro, kiu estas rektmetoda kaj kiu taŭgas egale por klaso, memlernado aŭ koresponda kurso. Kiel diras Prof. Enrique Balech, prezidanto de la Argentina Esperanto-Ligo, en la antaŭparolo, la nomo Hess estas ja garantio pri la valoro de la libro.

La kurso dividiĝas en dudek lecionojn, bone gradigitajn, kaj sekvas ĉiun lecionon mallonga vortlisto kaj ankaŭ (naci-lingve) klarigoj pri gramatikaj, sub la rubriko „La Instruisto Parolas“. Kontribuas al la didaktika sukceso de la libro la signifoplenaj kaj bonhumoraj desegnaĵoj de Carlos Wappers.

Troviĝas malmultaj eraroj — preskaŭ ĉiuj nur preseraroj — en la libro, kaj ĉi-rilate estas notinde, ke la eldonantoj pretiĝas mallongan earliston, por enmeti en ĉiun ekzempleron.

Gratulon al Hess kaj Wappers pro ilia sindona laboro kaj al la Argentina Esperanto-Ligo pro ĝia entreprenemo antaŭ multaj malfacilaĵoj, ĉefe financaj. W. M. G.

EKRIGARDO AL BUDHISMO * de D-ro R. L. Soni, M.B., B.S., F.R.H.S., ktp. 48-paĝa libreto tradukita el la angla lingva originalo „A glimpse of Buddhism“, eldonita de la Budhana Ligo Esperantista. Formato: 18 x 13, prezo: 1 ŝil. aŭ 2 steloj aŭ 3 respondkuponoj (sendkosto inkluziva). Mendebla de: „Clarach“, Abbey Drive, Gronant, Prestatyn, North Wales, Britujo.

Doktoro R. L. Soni, talenta punjabi kuracisto, estro de la Soni-Hospitalo en Mandalay (Burma), estas la unua grava konvertito de Respektinda Lakanatha Bikŝuo, kiu, per tuŝanta antaŭparolo, honoris tiun atentindan libreton. Li majstre iĝis budhano post aŭskultado de spiritaĵoj predikoj al sia Instruisto kaj lucida meditado pri la liberiĝo de ĉia homa sufero. Tiu verketo estas dankema omaĝo al lia iniciatinto kaj nur fragmento de serio el traktatoj ankoraŭ ne tradukitaj en Esperanton. Destinata al neinformita legantaro ĝi konsistigas mallongan, tamen rimarkindan enkondukon al Budhismo, bonegan abocan, kiu invitas al pli profunda esploro de la Doktrino.

Ĉi tie Budhismo estas konsiderata kiel religio, sen rito, sen preĝo, kies Instruanto (la Budho), liaj Instruoj (la Dharmo) kaj Instruatoj (la Sangho) formas la „Tri Gemojn“. Laŭ la *hinajana* tradicio, kiu konservas nedifektitaj la plej konatajn el la prelegoj de la Budho, la aŭtoro brile lumigas la kernan principon de la homa destino, t.e. la Karmon, leĝon de kaŭzo kaj efiko, kiu decidas

nian naskiĝon. „Kiel ni semas, tiel ni rikoltos, plimalpli frue, ĉi tie aŭ poste“. Tial de naskiĝo al morto, de morto al renaskiĝo eterne daŭradas la vojaĝo; dolorega vojaĝo por tiu, kiu ne venkos la kaŭzon de sia mizero per estingo de nescio kaj avido. La celo de la vivo estas senpovigi tiun karmon per superega saĝeco, kiu troviĝas en la „Kvar Juveloj“ de la budha filozofio, la Kvar Noblaj Verroj: scio pri sufero, estiĝo de sufero, ĉeso de sufero kaj la „Okera Vojo“ al la ĉeso de sufero. Jen la esenca bazo de la Dharmo.

Sed Doktoro Soni ne kontentiĝas teorie disertari pri tiu temo; ĉar li mem spertis la vekigiĝon al la budhisma idealo de saviĝo, li klare komentas la subliman Kodon de Etiko, kiu formas la praktikan flankon de la filozofio kaj trafe gvidas al perfektigo, trankvilo kaj paco per senlima Amo al ĉiuj sensantaj estaĵoj, memregoj kaj deca vivo. Budhismo estas ĉefe religio de absoluta libereco atingebla per morala pureco en la aĝoj, silenta meditado, prava scio kaj envido en sia intima naturo. La alta psiko de tiu kodo kondukas al neniiĝo de la iluzia memo, do al transcenda mensostato de pura ripozo, en kiu estas nek fariĝo, nek forpaso, nome Nirvano.

La Okcidentanoj, liberpensuloj kaj seriozaj scivolemuloj, estos intense altirataj per tiu orienta koncepto de la homa kondiĉo, kies jugo ne plu pezas sur la sinceraĵoj de tiu antikva, sed ĉiam floranta religio. Ĉu tiu mesaĝo de Lumo kaj Espero dispelas la egoismon kaj malamon, kiuj nunepoke venenas nian malserenan mondon, konkludas la aŭtoro? R.

LA KORO DE BUDHISMO. Sistema kurso pri Budhismo laŭ la Paliĵ Tekstoj de la cejlona Sanghano C. Njanasatta, bele presita de Amikoj de Budhismo en Tokio. 24-paĝa libreto; formato: 18 x 13, prezo: 1 ŝil. aŭ 3 respondkuponoj, mendebla de: Budhana Esperanto-Instituto, Verda Ermitejo, Kolatenna, Bandara-wela, Ceylon.

Oni jam scias, ke la tutmonda budhano ĉijare grandioze solenas Jubileon (jayanti) pro la 2500a datreveno de la forpaso de Gotama Budho, fondinto de Budhismo, kiu nuntempe nombras pli ol 550 milionojn da adeptoj. Krom piaĵ ceremonioj, kiuj okazas en Hindujo kaj Sud-Azio, kaj prelegoj en multaj okcidentaj universitatoj, floras gravaj artikoloj en ĉiulingvaj gazetoj por memorfesti tian eventon, ankaŭ por inici vastan publikon pri la instruado de la „Iluminulo“, kiu kvin jarcentojn antaŭ Kristo transdonis al la homaro sian mesaĝon el Paco kaj Amo.

Dank'al Lia Sanghana Moŝto Njanasatta, estro de la Budhana Esperanto-Instituto kaj viglagema delegito de U.E.A. en Cejlono, nia literaturo ĵus riĉiĝis per altvalora verko, kiu sen metafizikaj aŭ spekulativaj komentoj kristale resumas la ĉefkernon de la budha doktrino, kiun senpene asimilos ĉiu leganto

sciama pri la orienta penso. Redaktita en modela lingvo kaj bonege prezentata ĝi tutcerte interesos la Okcidentanojn pro ĝia klara, fundamenta, tamen sukoplana enhavo.

Ĉu Budhismo estas religio, filozofio aŭ scienco? Antaŭ ol decidi la aŭtoro unue demandas: „Kio estas religio?“ Li konsideras la ĝeneralajn konceptojn pri la religiaĵoj procedoj kaj formoj, kaj respondas, ke Budhismo estas *superteismo*, celante al la tuta liberiĝo de ĉia sufero per elkompreno, saĝo kaj mensa kulturo. Poste li majstre klarigas la esencon de la Doktrino (Dharmo), kies studado kaj aplikado kondukas al plibonigo de la homaj rilatoj kaj fine al stato de perfekta sereneco.

La dua parto temas pri Budhismo en la ĉiutaga vivo. Ĉar teorio sen praktika instruado estas senfrukta babilado. Plie en Oriento, filozofio estas ne intelekta sinteno, kiun oni povas plimalpli sincere alproprigi al si, kvazaŭ spirititan ornameton, sed la konstanta regularo, kiu gvidas ĉiujn individuojn en sia ordinara konduto. Ĝi praktike inspiras agadon kaj pensmanieron ĉar filozofio kaj religio estas unusola afero. En Budhismo, ama bonvolo, donemo, kompatio, virto estas la ĉefaj kolonoj de la socia etiko. Konsideroj pri sufero, relativeco, ne-daŭro, ne-memo vidigas al la studanto la ĝustan vojon dum lia surtera ekzisto, ĝis kiam li atingos mensan serenon kaj plenan liberiĝon se siaj silurmentoj. Amo al ĉiuj vivaj estaĵoj kaj silenta meditado estas la sezamo, kiu malfermas la pordojn de Nirvano. „Aŭskultu kaj studu, memoru kaj plenumu sekvu la Dharmon“, diris la Perfektulo. Tiam la Paco regos la korojn. Jen kion lume skizas tiu libreto, kiun ĉiuj adeptoj de nia interna ideo profite ellegos, ĉar ankaŭ ili fervore aspiras al vera universala frateco.

Oni povas ĝin akiri per mono aŭ per interŝanĝo kontraŭ esperantaj libroj kaj kursoj por infanoj, ĉar nia eminenta samideano urĝe bezonas taŭgan materialon por instrui kaj propagandi nian lingvon ĉe la cejlona junularo.

R.

PREDIKO EN LA KATEDRALO DE KOPENHAGO * la 5-an de aŭgusto 1956, de Pastoro Poul Jørgensen. 11 p. 16.5 x 13.5. Havebla ĉe: Duplikerings Bureauet, Amagertov 3, 2., Kopenhago, Danlando. Prezo: dan. kr. 1,00 aŭ 2 int. resp. kup.

Certe multaj kristanoj ŝatos posedi la tekston de tiu ĉi prelego, prononcita dum la 41a Universala Kongreso. Pastoro Jørgensen prenis kiel sian temon el la Evangelio de Johano: 3, 16—21.

ESPERANTO, la langue „passe-partout“ pour tous. Manuel d'Etude*. 18-leciona lernolibro de Esperanto (por franclingvuloj) de Jean Couteaux. N-ro 2 en la libro kolekto „Collection Nova“. Eld. Librairie des Editions NOVA, 19 Avenue Gustave-Dollfus, MULHOUSE (C.C.P. 555.35 STRASBOURG) Prezo (afrankite): 330 fr. fr.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de novembro 1956

N-ro. 288

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de oktobro 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	9754	15280
Individuaj membroj		
MJ	950	948
MA	3947	4386
MS	821	735
Pat.	9	9
DM	291	292
HM	58	54
	<u>6076</u>	<u>6424</u>
	15830	21704

DELEGITOJ

Brazilo

Bachoeira (Bahia) D.: Vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Praha (Bohemio) FD. (Arto: Muziko):
D-ro Pravolsav Sádlo-Páv, violon-
ĉelisto, Kremencova 15, Praha II.

Danlando

Nyköbing F. (Falster) D. S-ro Ronald
Rasmussen, Domadministranto, Eng-
boulevarden 51a.

Nyköbing El. (Falster) FD. (Elektro-
tekniko): S-ro Paul Maurus Ohrberg,
Emeritulo (kabloestro), Solvej 80.

Finnlando

Jaalanka (Oulun Lääni) D.: Vakas.
FD (Turismo): Vakas.

Lohja (Uudenmaan lääni) D.: S-ro Vilho
Nyström, Instruisto, Karstu.

Otanmäki (Oulun lääni) D.: S-ro Ilpo
Rinne, Instruisto, Kansakoulu.

Suomussalmi (Oulun lääni) D.: S-ro
Juhani Kiviluoto, Instruisto, Ämmän-
saari, Kurimon posti.

FD (Turismo): La D.

Turku (Turun ja Porin lääni) FD (Tu-
rismo: S-ro Lauri Storm, Laboristo,
Lutnantintie 9, Turku 1.

Francujo

Croix (Nord) D.: S-ro Lucien Giloteaux,
Sekretario 19, rue de Colmar.
FD (Junularo): La D.

Dieppe (Seine Maritime) D.: S-ro Ro-
bert Rétault, Fervojoisto, „Informejo”,
Gare Maritime.

Paris (Seine) FD (Junularo): S-ro Paul
Ciliga, Studento pri lingvoj, 17, rue
Duguay-Trouin, Paris VIe.

Vichy (Allier) D.: S-ro Marcel Pruvost,
Instruisto, 24, rue G. Clémenceau.

Roubaix (Nord) D.: Vakas.

FD (Junularo): Vakas.

Saint-Donat (Drôme) D.: Vakas.

Saint-Claud (Charente) D.: S-ro Lucien
Desnos, Helpapotekisto.

Germanujo

Bochum (Westfalen) D.: Vakas.

Hamburg FD (Juro): D-ro Walter Lipp-
mann, Advokato, Grillparzerstr. 4 I,
Tel.: 236328.

Herford (Westfalen) D.: Vakas.

Weiden (Bavarujo, Opf.) D.: Vakas.

Greklando

Kallithea FD (Turismo): F-ino Heleni
Polimeropulu, Student-instruistino, Li-
kurgu 163, Kallithea-Athinai.

Thessaloniki (Makedonia) D.: Vakas.

Hispanujo

Badalona (Barcelona) FD (Fervojaj
aferoj): Lokomotivisto, Strato Cari-
dad 34.

Madrid VD.: S-ro Ramón Pin, Knedisto,
Méndez Vigo 4 (Usera).

FD (Blindulaj aferoj): S-ro Ángel Figue-
rola, Profesoro, Costa Rica 20.

FD (Laboristaj aferoj): S-ro Severiano
Arnáiz, Komerclaboristo, Castillo de
Oropesa 5 (Co de San Blas).

FD (Mekaniko): S-ro Félix Gómez,
Apóstol Santiago 6 (Ventas).

FD (Metalurgio): S-ro Juan Calahorra,
Arta fandisto, Vinaroz 21, bajo, iz-
quierda.

FD (Poŝto): S-ro Manuel Martín, Poŝt-
oficisto, Francisco Silvela 60.

FD (Virinaj aferoj): S-ino Flora Alva-
rez, Dommastrino, Eduardo Dato 8.

Sabadell (Barcelona) VD.: S-ro Vicenc
Hernández Llusera, Ŝuisto, Avenida
Ejército Español, 59.

FD (Arto: Muziko): S-ro Ramón Ma-
nau, Mekanisto, Avenida Ejército Es-
pañol 116.

Hungarujo

Budapest FD (Korespondado): S-ro
Miklós Abrahám, Mekanikisto, Vörös-
hadsereg-utja 10. II. 6, Budapeŝt II.

Islando

Hveragerdi (Arnessysla) D.: Vakas.
FD (Ĝardenkulturo): Vakas.

Italujo

Alghero (Sassari) D.: F-ino Doloretta
Zedda, instruistino, Via Mazzini 15.

FD (Instruado): La D.

Biella (Piemonte-Vercelli) D.: Prof.
Konrado Ĉerri, Casella Postale 159;
loĝejo (nur por vizitantoj) via Eugè-
nio Bona 4/VII.

FD (Instruado): La D.

Cittadella (Padavo) D.: D-ro Dino Fa-
bris, Profesoro, Borgo Bassano 5.

Lecce (Puglie) D.: Vakas.

Milano VD.: Vakas.

Parma D.: S-ro Franco Bozzano, Bank-
oficisto, Via Italo Pizzi 29.

Piacenza D.: S-ro Vincenzo Corvi, Ofic-
isto, Casella Postale 22.

Pisa D.: Prof. Giuseppe Pacelli, Bel-
etristiko kaj mod. lingvoj, Via Crispi 1.

Ravenna D.: S-ro Angelo Duranti, Kato-
lika Pastro, Piazza Duomo 4.

Roma FD (Blindulaj aferoj): S-ro Vin-
cenzo Musella, Profesoro Doktoro, Via
Giuseppe Sacconi 4.

Torino D.: S-ro Francesco Rámolfo,
ĵurnalisto, Via M. Pescatore 4.

VD.: S-ro Eduardo Zumbo, Ex bank-
oficisto, Via del Carmine 4.

FD (Elektrotekniko): S-ro Giovanni
Francone, Oficisto, Via Silvio Pelli-
co 18.

FD (Medicino): D-ro Prof. Giorgio
Canuto, Jurmedicina Profesoro, Via
Chiabrera 37.

FD (Sporto): F-ino Chiara Dragoni, In-
struistino, Gian Franco re 11.

Trofarello (Piemonte) D.: S-ro Renato
Pennazio, Oficisto kaj ĵurnalisto, Via
Vagnone 1.

Izraelo.

Herzlia FD (Vivreformo): S-ro Morde-
chai Martin Maschler, Ĝardenisto,
House M. Liman, Herzlia „B”.

Jugoslavujo.

Dubrovnik (Dalmacija) FD (Arto):
Prof. Josip Vrančić, direktoro de art-
galerio, Umjetnička Galerija.

Roanda (Serbio) D.: S-ro Toma Steva-
nović M., Instruisto, Z.p. Plazane (kod
Despotovca).

Zagreb FD (Arkitekturo): S-ro Vladi-
mir Strucelj, Arkitekto-Teknikisto,
Krašova 27/IV.

Maroko.

Meknes VD.: Vakas.

Nederlando.

Apeldoorn (Gelderland) VD.: Vakas.
FD (Instruado): Vakas.

Krommenie (N.H.) D.: S-ro Jan Leguijt,
Komerca vojaĝisto, Krommeniedijk 60.

Ossendrecht (N.Br.) D.: S-ro Leon
Weijts, Lernejestro, Dorpsstraat 18.

Schiedam (Z.H.) D.: S-ro Gijsbertus
Mackenbach, Korespondisto, Vlaar-
dingerdijk 329a.

Utrecht FD (Studentaj aferoj): S-ro W.
Bruynesteyn, Studento, Acacialaan 4,
Zeist.

Zeist FD (Instruado): S-ro P. Enkelaar, Instruisto, Willem Pijperlaan 31.

Norvegujo.

Oslo D.: S-ro Kaare Myhr, Radiotelegrafisto, Kilenveien 9, Lysaker pr. Oslo.

VD.: S-ro Ludvig Anjer, Bankoficisto, Instruisto Komerclernej, Oberst Rodes Veg 76, Oslo-Nordstrandhögda.

VD.: S-ro Einar Gustavsen, Konditoro, Feltspatveien 42, Lambertseter.

FD (Sindikataj Aferoj): S-ro Henry Rusvik, Telefonmuntisto, Sarsgt. 31, opg. C.

Pollando.

Bialystok D.: S-ro Leon Kiodeck, Instruisto, Rynek Kosciuszki 13 m 9.
FD. (Teatro kaj Literatura): S-ro Lech Piotrowski, Literatura gvidanto de teatro, Państwowy Teatr.

Poznan FD (Kemio): S-ro Jan Pioro, Kemiisto, Str. Rokossowskiego 129/1.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956

728 Albuquerque, S-ro J. Ferreira de Piracununga, Brazilo.

729 Aquino, S-ino Guiomar Amélia de, Fortaleza, Brazilo.

730 Malaman, F-ino Stela Mary R., Piracununga, Brazilo.

731 Neves, S-ro Carlos Severo, Itapece-rica, Brazilo.

732 Campetti, D-ro Prof. Gaetano, Luc-ca, Italujo.

733 Chapman, S-ro J. Leo, West Palm Beach, Usono.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Van Lookeren Campagne, D-ro G. J., Zwolle, Nederlando.

Van Lookeren Campagne-Enklaar, S-ino H. M., Zwolle, Nederlando.

DONACOJ A.P.O.

F. G. Blazquez, Venezuelo: 6,28 gld.

M. H. VERMAAS
Administranto.

ANONCETOJ

Ne multaj libroj aperintaj dum la lastaj jaroj havis tian sanigan influon al nia lingvo kiel „Du Malsanoj en Esperanto” de H. A. de Hoog. Tial ĉiu esperantisto havanta lingvan ambicion kaj amon al Esperanto legu ĝin. Havebla rekte de la eldoninto aŭ de via nacia Esperanta eldonejo aŭ de la libroservo de U.E.A. Prezo sv. kronoj 4,40 inkl. sendkostojn. Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo, Poŝt-ĝiro 34 34 81.

Bahaa Kredo — Kiu deziras ricevi in-
formojn pri tiu nova mondreligio, fon-
dita de Baha'u'lláh en 1884, kies ĉefprin-
cipoj interalie estas unueco de la homa-
ro, abolo de superstiĉoj, de rasaj, naciaj,
politikaj, klasaj kaj religiaj antagonis-
moj, establo de Internacia Tribunalo de
Justeco, adopto de Internaciaj skribo kaj
lingvo, sin turnu kun int. poŝta respond-
kuponon al la fakdelegito por Bahaismo:
Manuel Freitas, Rua do Monte da Lapa,
49-1, PORTO, Portugalio.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan A. Bytheway, „Flat Four”, 1, Warring-ton Crescent, LONDON W. 9, Anglujo, Telefono CUNningham 4487.

Koresponda Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli ol 30 landoj laŭ-
dezire. Skribu, indikante vian aĝon kaj
aldonante respondkuponon al: Daniel
LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON
(Aisne), Francujo. Naciaj Esperanto-
gazetoj bonvolu afable represi tiun ĉi
anoncon.

Gekursanoj, komencantoj, deziras kores-
pondi tutmonde. Skribu al S-ro E. G.
Christiansen, Bording St., Danlando.

Novspeca ludo Roli por 5 personoj,
kun Esperanto-titolo kaj ludreguloj Dm.
12,70 plus 13 div. Esperanto emajl-insig-
noj Dm. 12,— Prezoj inkluz. afranko.
Ambaŭ aĵoj efike uzeblaj por Esp. eks-
pozicioj. Mendante sendu monon poŝt-
mandate al: Hans Gruber (13b) POC-
KING-HAID Nbay, Germanujo.

47- kaj 58-jaraj viroj, kaj 58-jara virino,
kurs-komencantoj deziras korespondi tut-
monde. Unu respondo garantiata. S-ro
Martin Adelind, Mossbanegatan 3, Kum-
la, Svedujo.

Gelernantoj 7-12 jaraj interŝanĝas poŝt-
markojn, poŝtkartojn kaj infandeseĝna-
jojn kun ĉiuj lernejoj el la mondo. Ni
organizos pedagogian ekspozicion. Skri-
bu tuj al K. Braet, B.P. 122, PAULIS.
(Kongo Belga — Afriko).

Letervespero 15/3 1957. Ankaŭ por fila-
telistoj. Bv indiki je la adreso „Leter-
vespero”. La Esperanto-Klubo de Lid-
köping, S-ro Åke Blomberg, Lottkälls-
qatan 2, Lidköping, Svedujo.

Deziras korespondi 25-jara fraŭlo pri
ĉio kun ĉiuj, interŝanĝi ilustritajn poŝt-
kartojn, filmojn, revuojn, fotografajojn.
Vasil Kostov Georgiev, Caro Kalojan
11, Stalin, Bulgarujo.

„La kongresa prediko” 1956 en la
Kopenhaga katedralo, bele presita kaj
bindita. Prezo nur 1 dana krono aŭ 2
respondkuponoj. Leonido Vasiljef, Ama-
gertorv 3,2, Kopenhago K., Danlando.

Sendu min 50 aŭ pli da sendifektaj poŝt-
markoj de via lando kaj mi sendos la
saman kvanton de svedaj markoj Inĝ.
Sten Öhrström, Nygatan 16, Bollnäs,
Svedujo.

Ora Jubileo! 1957. Tial Hannovera-Es-
peranto-Asocio aranĝos Varb-eksposi-
cion. Bonvolu sendi salutojn k.t.p. al
D-ro E. Heidemann, Hannover, Bischofs-
holderdamm 52, Germanujo. Nepra res-
pondo!

Deziras ricevi el tutmondo ilustritajn tek-
nikajn revuojn pri aviadiloj, aŭtomobiloj
kaj maŝinfabrikado, kontraŭ hispanaj
objektoj. Félix Gómez M., Apóstol San-
tiago 6, MADRID (9), Hispanujo.

Esperantistoj kiuj deziras ricevi infor-
mojn pri la celoj kaj agoj de „Libervola
Internaciaj Civila Servo” skribu al:
S.C.V.I., 77 Boulevard Jean Jaurès, Cli-
chy (Seine), Francujo.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝtformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Karaj Legantoj!

PAGU TUJ VIAN KOTIZON 1957

★

por ke vi ne havu konscienc-
riproĉon malfermante novan
numeron de la revuo ... kaj por
ke vi faciligu la laboron de nia
oficejo! Koran dankon anticipe.

**Mendu tuj viajn librojn por
la decembraj festotagoj!**

Libroservo de U.E.A. liveras
ĉien.

Ĉiam je via servo.

Ankaŭ por kristnaskkartoj.

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando

VAGADO SUB PALMOJ

La streĉe interesaj dezertaj
vojaĝimpresoj de

JEAN RIBILLARD
aperintaj en „Esperanto”

★ Nun en formo de libro!

Aperos en decembro 1956
Prezo: 2.50 gld; 10 steloj

Mendu ĉe U.E.A.!

Stafeto

Kiam ĝi eldonis la unuan libron, oni diris: „Estas neeble eldoni tiel belan, grandan libron je tiu prezo!”

Kiam eliris la dua, oni diris: „Tio ne povas daŭri!”

Kaj sekvis, ne unu, sed du libroj — samtempe!

Kaj solide, regule, la serio daŭras.

Kial?

Ĉar la Esperanta publiko estas inteligenta kaj ŝatas la belon.

Ĝi spertis, ke STAFETO liveras en luksa vesto absorban legaĵon de plej alta kvalito per tre modera prezo.

Vidu mem!

1. *Kvaropo*. Poemoj de Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti (Elĉerpita).
2. *La baptado de caro Vladimir*. Havliček, tradukis Pumpr. Brila vers-satiro, ĉiam aktuala, kun 52 originalaj ilustraĵoj de Josef Lada (Preskaŭ elĉerpita)
3. *El la maniko*. Bonhumoraj noveloj de Reto Rossetti.
4. *Koko krias jam!* La plej grava novelaro de Ferenc Szilágyi.
5. *Kontralte*. Poemaro de Marjorie Boulton, kiu ĉie vekis entuziasmon.
6. *Eseoj I. Beletro*, de Gaston Waringhien. Riĉa regalo de penso, klero kaj bonhumoro.
7. *La infana raso*, de William Auld. Grandioza pionira poemo en 25 ĉapitroj, kun 5 ilustraĵoj de Pierre Lavalle.
8. (Nun presata) *La floroj de l' malbono*, de Charles Baudelaire, tradukita de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Monda literatura evento. Plej alta pinto de nia traduka poezio.

Sekvos Antologio de la Esperanta Poezio en redakto de W. Auld, kaj kelkaj valoraj manuskriptoj, kies eldoniĝon garantios via subteno.



Belliteratura

eldonserio

La librojn liveras la eldonisto, UEA kaj ĉiuj gravaj centroj de la Movado

HELPU PLUPORTI LA TORĈON!

Eldonota verko unika en la literaturo
de Esperanto

SCIENCAJ STUDIOJ

(PROVIZORA TITOLO)

Okaze da la 50-jara jubileo de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA en aŭgusto 1956 oni decidis eldoni jubilean verkon de ĉ. 250 paĝoj en la formato de „Esperantologio”, sed presitan sur glata (kaj dika) papero.

La verko estas redaktata de d-ro Paul Neergaard, Akad., kaj la kontribuantoj estos la plej eminentaj sciencistoj-esperantistoj. En la humanisma parto estos la kontribuantoj pri lingvistikaj, juraj, historiaj, folkloraj kaj aliaj temoj. En la naturscienca parto estas anoncigitaj la temoj el astronomio, fiziko, kemio, geologio, hortikulturo-agrikulturo, botaniko, zoologio, medicino, ktp.

La enhavo estos varia. Ĝi prezentos laboraĵojn rekte prenitajn el la studĉambroj kaj laboratorioj de eminentaj sciencistoj, kiuj estos povintaj publikigi iliajn traktatojn en naciaj lingvoj, sed kiuj nun prezentos la rezultojn de iliaj esploroj en la Lingvo Internacia.

La Jubilea Verko estos kultura evento en la historio de Esperanto. Ĝi estos gravega dokumento pri la apliko de Esperanto en la scienco kaj montrinda al ĉiu interesato pri nia lingvo kaj movado. Kelkaj el la ĉapitroj estas alte sciencaj kaj specialismaj, atestantaj pri la kapablo de nia lingvo por la plej postulaj temoj. Aliaj ĉapitroj estas bone kompreneblaj de ĉiu ordinare klera homo kaj alportos interesan kaj ĝuigan legaĵon. La volumo konsistigos specon de Krestomatia de sciencaj traktatoj, ĝi estos modelo kaj stimulo por plua progresado de nia lingvo en la kampo de edukado, scienco kaj kulturo.

UTILIGU LA FAVORAN ANTAŬMENDAN PREZON!

La mendon bonvolu fari al la sekretario-kasisto de ISAE d-ro D. Brkić, Vojv. Putnika 118/V, SARAJEVO, Jugoslavio, per la

MENDILO: Per ĉi tio mi antaŭmendas la libron „Sciencaj studoj” kaj samtempe mi sendas la antaŭpagon de 18 danaj kronoj (2.60 us. dol. aŭ egalvaloro) al la dana del. de ISAE kand. farm. Vagn Jørgensen, Martinus Rasmussensgade 21 I, NYBORG, Danlando (poŝtkonto 21512).

Nomo kaj profesio/titolo

Adreso

Dato

(subskribo)

Kroatia Esperanto Ligo eldonis libreton:

TEATRO EN SOCIETO

Aŭtoroj: E. Lapenna, M. Mamuzić, S. Mulo.
Mallongaj originalaj teatraĵoj ludeblaj en societejoj, distre-karakteraj.

Scenejo, kulisoj, teatraj kostumoj nebezonaĵoj.
Konvena helpilo en laboro kun gejunuloj.
Programeroj por Zamenhofaj-vesperoj.
Legajo por konversaciaj kursoj.

Prezo: en Jugoslavio 120 Din, en eksterlando 2 ned. guldenoj.

MENDU ĈE UEA

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam